4-a Jaro. N-o 200 APERAS SEMAJNE 2. Aŭgusto 1928



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

# CIVILIZECO KAJ ARTEFARITECO

*Ni publikigas ĉi tie la unuan ĉapitron de verketo — preta por eldono — kies titolo estas:* **La Laborista Esperantismo**[1]).

*En ĉi tiu jubilea n-ro de nia gazeto utilas iomete prikonsideri ĝeneralajn principojn, kiuj povas gvidi nian agadon.* Red.

Kio karakterizas plej bone la evoluadon de la Homaro, tio estas ĝia tendenco eliri el mistika stato kaj celadi al racieco. En la plej primitivaj epokoj, la elpensemo de la homo igis lin artefari ilojn por ĉasi kaj sin defendi. La fabrikado de plej simpla objekto postulas la obeon al fizikaj leĝoj. Tial racieco povis iom post iom enpenetri la homan cerbon. La konstruado de domoj, de ŝipoj, la fabrikado de iloj kaj finfine de treege perfektaj kaj delikataj aŭ potencaj maŝinoj okazis samtempe kaj paralele kun la kreskado de la racio en la homa menso.

En la bonstato de l'homo, ĉiu progreso estas ligita intime kun artefariteco. Artefaritaj estas niaj manĝaĵoj kaj vestaĵoj. Plej bonaj fruktoj kreskas ĉe kulturitaj arboj, kaj oni povas eĉ diri, ke iel ili ankaŭ estas artefaritaj; ili almenaŭ estas arte kreskigitaj. La homo fariĝis la "reĝo de l' naturo" dank' al sia kapablo arte aliigi la medion, en kiu li vivas. La besto sin adaptas al la medio; la homo adaptas la medion al si. La civilizo estas rezulto de raciigado. Sed tio okazis ĝis nun preskaŭ senkonscie, ofte senmetode kaj nur laŭ limigita skalo. Ni eniras periodon[2]), en kiu ekzistas tendenco, konscie, metode kaj grandskale[3]) ĉion raciigi. La en-




naskita elpensemo de l' homo estas sendube ia v i v i l o. Hodiaŭ la scienco, la tekniko — rezulto de la malvolviĝanta racio en la homa cerbo — fariĝas kvazaŭ socia, kolektiva vivilo.

La fervojoj kaj vaporŝipoj, la aviado kaj senfadena telegraf- kaj telefonio malgrandigas la distancojn tiagrade, ke homoj el diversaj kontinentoj baldaŭ sentos sin kvazaŭ ili estus najbaroj. Ekzistas nehaltigebla tendenco al normigo, tipigo en la produktado. La mondo unueciĝas, dank' al senĉesa malvolviĝanta tekniko. La Racio, la Artefariteco triumfas. Estas tamen kampo, sur kiu ĝis nun la racio malmulte enplantiĝis. Ni aludas pri la multlingveco ekzistanta en la mondo, kaj kiu metas barojn inter la homoj el diversaj mondpartoj. Lokomotivoj kurantaj sur reloj en Eŭropo, en Ameriko, en Azio, en Afriko estas proksimume la samaj kaj povas esti kondukataj de ĉiu ajn maŝinisto. Aŭtomobilo aŭ aeroplano fabrikita ĉu en Parizo, ĉu en Tokio, ĉu en Novjorko, ĉu en Moskvo aŭ en alia urbo povas tuj esti kondukata de fakulo. La samon oni povas diri pri ĉio, kion produktas grandskale la moderna tekniko.

Sed en kelkaj partoj de l' mondo, homoj vojaĝantaj per rapidaj veturiloj baldaŭ renkontas aliajn homojn, kun kiuj ili ne povas interkompreniĝi, tial ke ili parolas malsaman lingvon. Ili uzas samajn ilojn, sed tiujn ilojn ili nomas per malsamaj vortoj. Sur la lingva kampo regas ankoraŭ la mistika primitiva stato. Ĉi tie ankaŭ necesas raciigadi. Antaŭ kelkdekoj da

jaroj, eĉ lingvistoj opiniis, ke lingvo estas kvazaŭ viva organismo; ke sekve estas tute ĥimera la provo starigi racie artefaritan lingvon. Same plej famaj kaj kleraj homoj neis siatempe la eblecon veturi per vapormaŝinoj. Aliaj mokis la "fantaziulojn", kiuj provis imiti la birdojn kaj flugi per artefaritaj aparatoj . . .

Hodiaŭ la lingvo-scienco instruas, ke lingvo estas socia institucio tradicia; ke la homa volo senĉese influas en lingvaj aferoj. Plej aŭtoritata lingvisto skribis antaŭ nelonge: "La ebleco starigi artefaritan lingvon, facile lerneblan kaj la fakto, ke tiu lingvo estas utiligebla, estas pruvitaj per la praktiko. Vana estas ĉia teoria diskutado: esperanto funkciis[4])." Kaj en la sama libro la aŭtoro konkludis: "Nur artefarita lingvo povas doni al la internaciaj rilatoj la praktikan kaj simplan ilon, kiu mankas por ili." Racieco komencas penetri ankaŭ sur la lingvan kampon.

E. Lanti.

---

1) La enhavtabelon oni legu ĉi sube.

2) "Ĉiu historia periodo havas siajn proprajn leĝojn . . . sed tuj kiam la vivo transpasis la periodon de donita evoluo, kiam ĝi eliris el donita stadio kaj transiris en alian, tiam ĝi estas regata de aliaj leĝoj." K. Marks.
Laŭ cito de N. Buharin en "La teorio de l' historia materialismo", pĝ. 68, de la franclingva eldono.

3) Raciigado en kapitalista soci-ordo tendencas nature okazi ĉefe por la profito de la ekspluatanta klaso. La Ekspluatitaro devas batali ne kontraŭ la raciigado mem, sed kontraŭ la maniero laŭ kiu la burĝaro tendencas raciigi. Vera raciigado cetere devas celi la bonstaton de la tuta homa speco.

4) "Les Langues dans l' Europe Nouvelle" (1918) (La Lingvoj en la Nova Eŭropo) de A. Meillet, profesoro ĉe la Pariza Universitato, direktoro de studoj ĉe la lernejo de Altaj Studoj.


Baldaŭ aperos:

E. LANTI

**LA LABORISTA ESPERANTISMO**

**I. Civilizeco kaj Artefariteco**
**II. Viva artefarita Lingvo**
**III. Esperanto je la Servo de l' Proletaro**
**IV. Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)**
a) **Ĝia celo**
b) **Ĝia strukturo kaj organizeco,** Sekcioj
c) **Ĝia superpartieco,** Frakcioj
d) **Ĝiaj taskoj** Interhelpo, Informado, Klerigo, Eduko, Kulturo, Literaturo
**V. Apero de nova Tendenco: Sennaciismo**
**VI. SAT kaj la nacilingvaj Asocioj esperantistaj**
**VII. SAT kaj la oficialaj Institucioj de la Esperantistaro.**


# ĈE LA SOJLO DE L' TRIA CENTO

Oni kutimas ĉe diversaj jubileaj datoj noti ilin ĉu per artikoloj de alta stilo, plenaj de brilaj kaj sonantaj frazoj, ĉu per rememoroj pri la pasintaj tagoj de l' jubileulo.

Sed kiam jubileas gazeto, tiu kutimo ne estas facile plenumebla. Des pli, kiam temas pri Sennaciulo. Ja estas iel strange paroli pri ĝia pasinto, dum ĝi estas estanto de nia movado. Kaj . . . — kiam vi tenas en la manoj freŝan numeron de "S-ulo" — ĝi ĉiam estas iu signo de estinto: ĝiaj kunlaborantoj relegas en siaj artikoloj la pensojn kaj la ideojn, kiujn ili havis antaŭ kelkaj semajnoj kaj super kies publikigo kaj diskonigo jam laboris gazeta redaktoro, kompostistoj, korektistoj, enpaĝigistoj, presistoj, ekspedistoj, poŝtistoj . . .

Kaj . . . kiam vi legas freŝan numeron de "S-ulo", — ĝi estas organizanto, organizilo de nia estonto: ĝi ja instruas kaj inspiras por la novaj agoj, ĝi organizas ilin . . .

* * *

Kiam "S-ulo" ne jam estis infano, kiam ĝi estis nur ĵus embriiĝinta, aŭdiĝis voĉoj de iuj SAT-anoj, cetere fidelaj asocianoj kaj fervoregaj movadanoj, pri la danĝeroj, ligitaj kun la semajna apero de l' gazeto.

Ili timis, ke ne sufiĉos la fortoj de SAT-anoj kaj iliaj monrimedoj, por dece nutri kaj kreskigi la semajnulon. Ili singardeme konsilis dusemajnan aperigon de l' gazeto . . .

Ili eraris: la semajnulo ne nur restis viva, sed bone fortikiĝis kaj staras jam pli firme sur siaj kruroj, ol ĉe la pli aĝaj "fratoj" el la samlingva gazetaro.

Ili eraris, ĉar ili ne taksis tute aŭ ne sufiĉe taksis la organizan rolon de gazeto. Nia gazeto, fariĝinte ĉiusemajna, ne nur ne mortis, sed kreskigis niajn vicojn.

* * *

Ĉiu organizo estas des pli firma, ju pli ofte interrilatas ĝiaj membroj. Provu organizi grupon el viaj samurbanoj, seniginte ilin je ajnaj rimedoj de interkomuniko. Provu funkciigi la laborejon, en kiu vi laboras, seniginte ĝin de la internaj kaj eksteraj komunikiloj. Vi malsukcesos. Kiamaniere do povus funkcii la asocio, kies membroj estas dissemitaj tra la tuta terglobo, — se ili ne havus la solan interkomunikilon — la gazeton?

Kontraŭe — se estas iuj fortoj kaj kaŭzoj, malhelpantaj ekzistadon de iu organizo, gazeto povas iagrade anstataŭi la organizan centron. Tion instruas al ni la ekzemplo de la iama Rusio, kie cara reĝimo estis malpermesanta fondon de tutlanda esperantista organizo kaj kie la gazeto, eldonata de privatulo, sukcesis bone organizi la movadon sen membrokartoj. Pri la samo atestas la praavo de "S-ulo" — la antaŭmilita "Internacia Socia Revuo", organizinta ĉirkaŭ si la revolucieman esperantistaron, kiam ĝi estis ankoraŭ tre malforta por fondi sian propran organizon.

* * *

Sed nia "S-ulo" estas ne nur organizanto: ja ĝiaj legantoj plejparte estas samtempe ĝiaj kunlaborantoj, — do samtempe organizatoj kaj organizantoj, por kiu "S-ulo" estas organizilo.

Tial ĝojigas min ne la fakto, ke nia Jarlibro ĉiujare entenas ĉiam pli ampleksan adresaron de SAT-membroj, kaj ne la kreskantaj numeroj de iliaj membrokartoj — ĝojigas min la multeco de pernumeraj subskriboj en "S-ulo", ĝojigas la grandaj numeroj de membrokartoj, kiam ili najbaras en "S-ulo" kun la artikoloj, subskribitaj per la malgrandaj membronumeroj.

Ja nia forto estas ne nur en nia nombro, sed precipe en nia aktiveco kaj en nia kolektiveco.

* * *

Simpla estas la konkludo:

Kiam vi intencas varbi iun K-don al SAT — montru al li "S-ulo"-n, rakontu detale pri ĝia varia enhavo, demandu pri kio li dezirus legi en "S-ulo", proponu al li mem verki artikoleton pri la simila temo kaj ĉiam montru al li freŝan numeron, kiam en ĝi estas artikoloj, interesaj por la varbato. La rezulto estas senduba — li abonos la gazeton kaj rezulte nepre aliĝos al SAT.

Kial tio estas senduba? — Ĉar SAT ja estas aparato de lingvo-praktikado, kaj oni povas varbi bonajn adeptojn, nur se ili vidos la praktikan valoron de tiu aparato. Kaj ĝuste tion montras "S-ulo".

* * *

Miaj lastaj linioj estas direktataj al la jubileulo mem:

Pardonu, kamarado de niaj bataltagoj, ke en la horoj de via ducentnumera jubileo, mia krajono kapablis esprimi nur kelkajn penserojn, sed ne la belvortan kaj festenan artikolon.


Mi ja celis pensigi ne pri la ducent pasintaj semajnoj, ne pri ducent jam aperintaj viaj numeroj, — mi celis pensigi pri la nova, pri la tria cento de viaj semajnaj folioj . .

Gr. Demidjuk (1516), Moskvo.

# La kondiĉoj por la venko de esperanto

Nia movado firme kaj bone teniĝas. Jam aperas la 200-a numero de Sennaciulo, kaj baldaŭ okazos nia 8-a Kongreso: sepjara ekzistado de SAT! Ni povas fieri pri tia evoluo de unu el la plej atentindaj branĉoj de la kultura aktiveco de l' tutmonda Proletaro.

Certe, aliaj organizoj proletaj konis pli rapidan supreniradon, pli facilajn sukcesojn, pli vastan etendiĝon dum la sama tempospaco. Sed ni serioze komparu: kiu el ĉiuj aliaj proletorganizoj havas same penigan laborkampon kiel nia? Kaj kiu el ili agadis, same kiel SAT, sen subteno, ne ricevante monrimedojn de aliaj organismoj? Ĉiuj progresoj de SAT estas fakte kaj vere sukcesoj de la nura SAT-anaro. Des pli ni rajtas fieri, ne nur pri niaj sukcesoj, sed ankaŭ pri nia sendependeco, spirita kaj materia!




La esperantista movado proleta batalas en malfavoraj kondiĉoj. Konsciaj pri la gravega rolo de la Laboristaro en la starigo de la nova mondo socialista, ni nin turnas al la amasoj de tiuj, kiuj estas, en la burĝa reĝimo, la kulturpariaoj. Jam hodiaŭ la proleta scienco estas sur iuj kampoj supera al la burĝa scienco. En ĉiuj branĉoj de la socia vivo: studado de la historio, ekonomio, kompreno de la grandaj bataloj de nia jarcento, la Proletaro superas sian kapitalistan kontraŭulon. Sed ĝi povas plene liberiĝi el la spiritaj katenoj de la kapitalistaro, nur post kiam ĝi prenos mem en siajn manojn la regilojn de la ŝtato. Kaj ĝis tiu tempo nia movado restos limigata al relative malgranda agadejo.

La horo de esperanto sonos, por grandskala disvolviĝo, nur post la fintriumfo de la proleta liberiĝbatalo. Marks kaj Engels diris al ni, ke la socialismo estas realigebla nur internacie, kaj ne en nacia kadro, kiel ajn vastaj estu la limoj de unu ŝtato kun socialista registaro. Kaj ĉar socialismo povas esti nur tutmonda sistemo, ĝi entenas samtempe la kondiĉojn kaj la necesecon de la venko de esperanto; la kondiĉojn: ĉar sen la liberiĝo de la laborista klaso, ĝenerala aplikado de esperanto ĉiam renkontos preskaŭ nevenkeblajn malhelpaĵojn; la necesecon: ĉar en tutmonda komunumo socialista, la uzado de lingvo internacia fariĝos ebla kaj neevitebla. Kaj nur tiam la problemo de sennaciismo staros antaŭ ĉiuj homoj en sia tuta praktika realeco.

La triumfo de esperanto tiomgrade koincidas kun la triumfo de l' socialismo, ke tiuj samceleco kaj interdependeco rimarkiĝas eĉ en detalaj demandoj de la proleta klasbatalado. Por realigi la socialismon, la Laboristaro bezonas senliman aktivecon, plenan liberecon por pensi kaj agi. Kontraŭe al la burĝa revolucio, kiu estis gvidita de malgranda nombro da senfine sindonaj, sinoferemaj ĉefoj (jakobinoj) sur la dorso de nekonscia, gvidata amaso, la proleta revolucio povos triumfi nur per la propra agado de la Laboristaro, kies gvidantoj devas esti libere elektataj plenumantoj de la amasa volo.

"La socialista socisistemo, skribis Roza Luksemburg, devas kaj povas esti nur historia produkto, naskiĝanta en la lernejo de la sperto, je la horo de la realigoj, per la irado de la vivanta historio, kiu same kiel la organa vivo, kies parto ĝi estas, havas la bonan kutimon naski kun ĉiu reala socia bezono ankaŭ la rimedon por ĝin kontentigi, kun la problemo la solvon. Se tio estas fakto, tiam la socialismo evidente ne povas esti trudata kaj ne povas esti starigata per ukazo[1]) . . . Oni povas dekreti la detruon; oni ne povas dekreti la konstruon. Nova lando. Miloj da problemoj. Nur la sperto kapablas korekti kaj malfermi novajn vojojn. Nur senbride fermentanta vivo fluas en mil novajn formojn, improvizas, ricevas kreantan forton, korektas mem siajn erarojn . . . Absoluta publika kontrolo estas necesa. Alimaniere la elŝanĝo de spertoj estas ebla nur en malgranda, fermita rondo de la oficistoj de socialista registaro."

Tiuj vortoj valoras ne nur por la politiko en ŝtato, kiu volas realigi la unuajn paŝojn al socialismo, sed ankaŭ por la kultura aktiveco de la Laborularo, por la florado kaj prosperado de esperanto.

Multfoje ni spertis ĉe laboristaj partioj diverstendencaj ian malemon al esperanto. Nur la plej libera, malkatenata publika vivo estas garantio kontraŭ la "malesperantismo" de iuj proletargvidantoj.

La destino de esperanto estas rekte ligita al la destino de la socialismo, estas ligita al la senbrida aktiveco, al la propra agado de la Proletaro. Same kiel socialismo ne povas esti starigata per ukazo, esperanto ne povas esti enkondukata kaj uzata per dekreto. Por prosperi, ambaŭ bezonas fermentantan vivon, liberan disvolviĝon, senĉesan plugadon de la laborkampo, sendogmecan atakon, ĉiam renovigotan, de la opinioj plej profunde enradikiĝintaj. Libereco estas necesa por la proleta kulturo en la socio kiel suno kaj aero por la libera kaj riĉega kreskado de la plantaro en la naturo.

Lucien Revo.

1) Dekreto.



# DE IU, KIU ĈEESTIS

La jubilea numero 200 de nia "S-ulo" rememorigas tempon, en kiu nia infano (SAT) estis baptata. Certe ĉi tiu tempo estas memoriginda en la nuntempo, en kiu nia kieskinta infano marŝas, kvankam nerapide, tamen normale.

Praha estis la baptoloko. Subkongreso oni titolis nian fondiĝkongreson, sed vere ĝi estis kongreso superanta la universalan Dektrian laŭ spirita enhavo. Ni rigardu la laborkunsidojn de tiel nomataj neŭtraluloj en Praha. La vizito al ili estis treege malbona kompare kun la nombro de la partoprenintoj registritaj, kaj el tiuj, kiuj ĉeestis, estis sufiĉe multaj dormemaj. La plejmulto entute preferis pli agrablajn restadejojn, pri kio atestis multe da sidlokoj neokupitaj. Do iliaj laborkunsidoj estis enuigaj kaj malviglaj.

Kompare kun la burĝtendencaj esperantistoj nia nombro estis tre malgranda, sed niaj laborkunsidoj estis tre viglaj kaj fruktedonaj. Oni povis diri: "Nova vivo ęstiĝis en la esperanta movado. 40—50 Gek-doj el 8—10 landoj partoprenis nian manifestacion. Ĉu ne bagatelaj ciferoj konsiderante ilian mondskalecon? Ĉu ne arogeme, kiam mi diras: nia Unua superis la Dektrian universalan? Tute ne! Ĉar ĉe la burĝoj amuzo estas la ĉefa afero; ĉe ili esperanto estas ia sporto; en ilia movado estas putreco. Male, en niaj kunsidoj ni serioze laboris. Ĉe ni estas nevenkebla volo. El nia movado elkreskas sennaciuloj. Ni prezentas la forton, ni anoj de proleta klaso, estonte venkonta.

En lernejo ni kongresis la unuan fojon. Ĉu tio ne estas multsignifa? Jes, tio kvazaŭ diris: "Se vi volas progresigi vian movadon, lernadu, studadu kaj kleriĝadu kaj instigu, ankaŭ viajn samklasanojn fari la samon. Vi ne sole prenu de la frukto "Scio", ankaŭ donu al aliaj da ĝi!"

Sidaĉante sur lernejaj benkoj, kiuj por plenkreskuloj estas tre malkomfortaj sidlokoj, ni intertraktis la tiaman organizan projekton kaj ekkonstruis nian "loĝejon". Tre malsamaj estis la opinioj. Tri grupoj luktis, unu kontraŭ la alia. Iuj K-doj grupiĝis ĉirkaŭ K-do Klauber, Berlin, aliaj samopiniis kun K-doj Adam (kiu laŭdire sin mortigis antaŭ kelkaj jaroj kaj transdonis sian heredaĵon al K-do Lanti) kaj B. el Parizo. Trian grupon gvidis K-do Deubler. La diskutado kelkfoje estis sufiĉe akra, tamen frateca. Emociige skizis hungara K-do la teroron kaj suferojn en sia lando, pledante tion konsideri en la mondasocia afero. Liaj paroloj kaŭzis larmojn ĉe iuj kaj eĉ ĉe perbatale harditaj homoj. Post longdaŭra diskutado oni akceptis la projekton de la Parizaj K-doj kun etaj ŝanĝoj. Post kiam la artikolo "unu" kaj "du" — pri celo kaj membreco — estis akceptitaj, rapide alproksimiĝis la fino.

Ankaŭ malagrablaĵo okazis. Nia honorprezidanto K-do Barbüs (france: Barbusse) estis sendinta salutskribaĵon al nia Unua. Sed la "K-do" komisiita laŭtlegis ĝin en la universala kongreso. Pro tio ĉe ni granda ekcitiĝo. Ni diskutis pri protesta ago. S-ro Privat intervenis kaj provis glatigi la ondegon de kolero. Li malsukcesis, ĉar la kolero pri tia fiago estis tre forta. En venonta laborkunsido ni pere de K-do B. indigne protestis. Kompreneble malgraŭ tio la perfido restis fakto. Ĉe la fino de la koncerna kunsido la burĝoj spiris pli facile, ĉar ili estis timintaj okazon de io terura, sed "sangoverŝado" ne okazis.

En nia lasta laborkunsido angla pacifistino radikala provis nin influi kaj konverti, por ke ni ne turnu armilojn kontraŭ niaj turmentistoj. Vana estis ŝia klopodo, ni restis klasbatalantoj.

Post la fino de nia unua kongreso ni disiris amikece, kaj forte impresitaj ni estis de niaj laboroj. Ni estis konsciaj, ke ni metis la unuan ŝtonon por la fundamento de giganta konstruo, en kiu loĝu homoj sennaciecaj. Tiutempe ni eĉ ne riskis revi pri semajna presorgano, tamen ni jam disĵetis la semon, por ke la 200-a numero de "S-ulo" povu aperi. Ĉe tiu ĉi grava okazo ni estu konsciaj pri tio, ke ni devas gardi treege la marŝantan infanon, por ke ĝi ne devojiĝu kaj pereu!

Senheredigito.

## DORNOJ

*La plej bonaj kaj valoraj n-roj el la kolekto de "S-ulo" estas tiuj, en kiuj aperis . . . miaj artikoloj — pensas ĉiuj el ni.*

*

*Mi kompatas redaktoron, kiam li devas enmeti artikolojn pli bonajn ol la siaj . . .*

*

*Iu laŭdis mian artikolon, kaj ĉagrene mi pensis: "Kredeble mi diris en tiu artikolo banalaĵojn."*

*

*Se por refuti vidpunkton* klare *eldiritan en 50 linioj, kontraŭulo bezonas skribi 100-linian artikolon, ne povas esti dubo, ke la "refuto" refutas nenion.*

*Sed por refuti* malklare *eldiritan opinion, oni kelkfoje bezonus skribi multajn paĝojn. Tiaokaze estas preferinde tute silenti.*

*

*"Mi petas, ke vi ne prokrastu la aperon de mia artikolo", insistas ĉi tiu — kiu ne antaŭvidas la oscedon de la legonto.*

*

*Bona verkisto penas por eviti penon al leganto — kaj plie ne forgesas, ke la unua leganto troviĝas en la redaktejo . . .*

*

*Se ideoj estas fortaj, ĝuste kaj korekte esprimitaj, tiaokaze la leganto penadu por kompreni. Verkisto ne povas konsenti kastradon de sia penso.*

Eŭtrapel.

## Kiam la patrino de "S-ulo" venis al Leipzig

Jam en Prago, kiam fondiĝis SAT, niaj Parizaj K-doj plendis pri la malfacila financa bazo de nia entrepreno, ĉar la abonantaro al "Sennacieca Revuo" ja estis tiom malgranda kaj Francio estis tiutempe lando kun bona valuto, ke la preskostoj en Francio ĉiam superis la enspezojn. Pro tiu kaŭzo niaj Parizaj K-doj konsideris la presadon en Germanio, ĉar en tiu lando ja komenciĝis "vigle kaj libere" la inflacio.

Reveturante de Prago al Parizo K-do B. vizitis la Leipzig-an Lab. Esp. Grupon, kie oni interalie en malvasta rondo pritraktis tiun aferon. Koncize kaj bone! K-do Richter estis komisiata peti ofertojn ĉe diversaj presejoj en Leipzig. Tiu de "Uns-presejo" estis la plej favora. Ni informis niajn Parizajn K-dojn, kaj jam oni decidis presigi la decembran-januaran n-on 1921/22 en Leipzig. Despli, ĉar la antaŭa n-o, presita en Boĵe (france: Beaugé, malgranda provinca urbo) estis tute fuŝita.

Post kiam la manuskripto de tiu n-o alvenis en Leipzig, ankaŭ multiĝis la laboro por K-do Richter, kaj li petis min aranĝi tiun aferon komune. Antaŭe ni sendis la presitajn kajerojn al Parizo, por ke ili de tie estu ekspedataj, ĉar la sliparo ja troviĝis en la manoj de K-do Glodo en Parizo. Tamen ne longe daŭris tiu afero, ĉar tiu procedo ja estis tro komplika. Ni simple petis, ke oni sendu la adresilojn al Leipzig por mem fari la ekspedadon. Per tio kompreneble ni ankoraŭ pli estis ŝarĝataj, ĉar ni ja faris tiun laboron post nia panakira. Krom tio ni multe laboris por la loka esp. movado, ĉar la milito preskaŭ tute estis detruinta ĝin ankaŭ en Leipzig.

Sed jam ĉe la unua n-o, kiu estis presita en Leipzig, ni havis malgrandan epizodon, kiu certe interesos la legantojn. K-do Lanti sendis la materialon al la adreso de K-do R.; ĉi lasta venis al mi vespere, ĉar mi revenis hejmen nur je la 20-a horo, kaj kune ni ordigis la tutan aferon. Sed ho ve! "Uns-presejo" antaŭ nelonge estis fondita, la instaloj estis tute primitivaj, krom tio neniu kompostisto aŭ presisto sciis esperanton kaj la konsekvenco estis, ke la eraroj svarmegis en la presprovaĵoj, kaj kiam ni korektis ilin, la kompostisto faris novajn. Flanke de la presejo oni jam sendis la paĝigitajn presprovaĵojn al Parizo, kaj ni atendis scivole ĝian revenon post korektoj de K-do Lanti. Tempo pasis, ni atendis,

atendegis, sed la presprovaĵoj ne revenis. Proksimiĝis la tago de la ekspedado, la presprovaĵoj ne venis. K-do Richter kaj mi sidis kiel sur fajro, nenio helpis. Mi diris al K-do Richter, ke verŝajne ili perdiĝis survoje. Do, mi komencis legi, sen manuskriptoj, ĉar ili ja estis senditaj kune kun la presprovaĵoj al K-do Lanti. Ankoraŭ ne firme konante la korekt-signojn mi studas mian libron, en kiu tiuj signoj troviĝis. Sed ho ve! mi legas kaj legas, kaj jam ĉe la unua artikolo mi trovas, ke la tuto estas ia "salato". Mankis tutaj linioj, aliaj estis duoblaj, vortoj estis tute kripligitaj, ne plu rekoneblaj. Fulmotondro! diablo prenu! kion fari? Mi enpakis mian "salaton" kaj veturis trame en la "Harmonio"-n (kunvenejo de niaj K-doj), ĉar mi sciis, ke tie estis ankaŭ fakuloj (kompostisto kaj presisto). Sed bedaŭrinde ili ankaŭ ne povis helpi al mi, ĉar la manuskriptoj mankis. Dimanĉe, la sekvontan tagon, mi ree komencis legadi kaj provis iom fliki la artikolojn. Vespere mi atingis almenaŭ tion, ke la artikoloj havas ioman signifon. Lundon matene ni donis la prespermeson al la presisto, sed avertis, ke li almenaŭ atendu ĝis la 8-a, kiam la poŝtisto estas veninta. Mi restis hejme, ĝis la poŝtisto venis, kaj feliĉaj ni estis, kiam la materialo de K-do Lanti ankaŭ alvenis[1]). Unu, du, tri, sur la biciklon, kaj mi rapidegis en la presejon, por ĝustatempe ankoraŭ atingi la ekpresadon. La 21. 1. 1922 ni pagis 6729,90 mk. g. por la unua n-o, presita en Leipzig, kaj la spektaklo finiĝis.

Sed per tio nia laboro ne ĉesis. Nia movado kreskis kaj sekve ankaŭ la laboro. Estis tre malvarma vintro. Tre frue krepuskiĝis, nur vespere ni venis hejmen. Iomete manĝinte, ni kunvenis en la kuirejo de K-do L. kaj priparolis niajn SAT-aferojn. Ofte ni legis la presprovaĵojn ĝis la unua kaj dua horo nokte. Ĉar la nokto estis senindulge malvarma, ni surmetis la mantelon. Se ni hodiaŭ pensas pri tiu komenca epoko, tio efikas kvazaŭ sonĝo. Ne eblas ĉion citi ĉi tie, ĉar tempo mankas.

Aparta ĉapitro ankaŭ estus la inflacio: ni pagis iam por unu eldonkvanto da 3400 ekz. de "Sennacieca Revuo" la majestan sumon de **16 706 265 120 mk. g.** Se SAT havus hodiaŭ tiun sumon, ni ne bezonus "Municion". (90—125)

[1]) La legantoj ne forgesu, ke en tiu tempo la poŝtaj rilatoj inter Francio k Germanio ne ĉiam estis glataj; ofte okazis prokrastoj ĉe la landlimo pro severa kontrolado de la okupacia militestraro.

# Marksismo kaj esperanto

Propagandante inter socialistoj esperanton mi ofte renkontas apation. De teknika vidpunkto ili ne povas kritiki la facilecon en akirado, la mirindan meĥanismon de la verbo, la sciencan kaj regulan gramatikon ktp. Ili devas konsenti, ke neŭtrala, sennacia lingvo multe helpas kaj faciligas la diskuton kaj komprenon ĉe kongresoj kaj en ĉiu sfero de la vivo, kaj ke ĝi



*Klopodu, sennaciuloj,*
*En vasta mondo nur per vi . . .*

speciale utilas al nepoliglotaj laboristoj. Sed ili ne volas lerni la lingvon kaj propagandi ĝin. Jen ilia argumentado:

"La triumfonta ekonomia Imperio decidos la aferon, ĉar ĝi ŝovos sian lingvon kaj kulturon en la gorĝon de l' aliaj nacioj. Ne utilas, ke socialistoj propagandu tion, kion nur ekonomia evoluado kaj konkurado fine difinos."

Certe tia vidpunkto pri meĥanika, aŭtomata, fatalisma decido estas falsa marksismo. Historia Materialismo ne neas la influon de la idealo; ĝi nur montras ĝian bazon kaj klarigas la konduton de la homo. La ekonomiaj fortoj povas esprimiĝi nur per la homo; ili ne funkcias en vakuo[1]). Respondecaj ni estas en la afero de emancipo de nia klaso, en kontraŭstaro al ĉia ŝovinismo. Kiel pli bone kontraŭbatali la lingvan flankon de nuntempa ŝovinismo, ol per subteno de nia supernacia lingvo? Kompreneble ni ne estas utopiistoj, esperante ŝanĝi la mondon sole per neŭtrala lingvo. Sub kapitalismo certe komuna parolilo ne "por eterna ben' efektiviĝos". La brita laboristo kaj la kapitalisto ekzemple parolas same, sed ili ne ĝuas inter si "la sanktan harmonion". Notinde Zamenhof mem krom sia lingvo pledis por la "homaranismo". Ni SAT-anoj uzas kaj uzos esperanton kiel batalilon je servo de la Proletaro.

Sed eble interesos la indiferentulon la fakto, ke en sia origino kaj en sia disvastiĝo kaj fina sukceso la esperanta movado dependas de ekonomia kondiĉaro. Kial la genion de Zamenhof ne naskis Britio aŭ alia simila lando? Ĉu la aero en Bjalistok (naskiĝloko de Zamenhof) speciale nutras tian homon? Nek en insulo nek en granda izolita popolo, sed en la malgaja litova lando, kie rasoj kaj lingvoj miksiĝas — jen la hejmo de esperanto. "...En Okcidento la gentojn dividas ja limoj naturaj, dum en Oriento vivas ili miksite. Sur litova tero kvar gentoj malsamaj loĝadis en urboj, kun celoj kontraŭaj, kun lingvoj diversaj, kun kredoj malamikaj. De strato al strato ja regis malfido, suspekto, sur placoj ofendo ĉiutaga, venĝemo, persekuto kaj malamo." Evidente la ideo de internacia komprenilo ne falis el ĉielo. La bezono ĉiam instigas la genion.

Simile pri uzado de la lingvo. En Eŭropo la naciaj lingvoj firme formiĝis, kiam la kresko de apartaj diversaj nacioj, t. e. sekcioj de ekaperanta kapitalista klaso, rompis la katolikan unuecon de la mezepoko. Kontraŭe, interne de ĉiu lando lokaj dialektoj tendencas malaperi ĝuste tiagrade, kiel la transportiloj detruis la barilojn de distanco, kaj fine kreskis nacio edukadsistemo, nacia ĵurnalaro ktp. La evoluado de l' kapitalismo mem bezonas kaj ebligas tion. La progreso ne haltis, kaj nun ĉiutage la rilatoj inter nacioj plimultiĝas.

La grandega vaporŝipo, la rapide iranta lokomotivo, la aeroplano facile fluganta super la landlimoj, la kablo submara, la Radio parolojn donanta trans milojn da kilometroj — ĉi tiuj unuigas la mondon, ligas bordon al bordo, rompis la barilojn de distanco. Tia teknika evoluado estas la bazo, el kiu kreskas la internacieco, la supernacieco kaj fine la sennacieco. Ni laboras laŭ la tendencoj de l' socia evoluo. Al la fatalismaj "marksanoj" ni diru:

"Ni povas rapidigi aŭ prokrasti progreson."

[1]) Malplena spaco.

Esperanto sole ne helpus nin, sed kuniĝata kun la socialismo — kiu mem estas produkto de mondskala ekspluatado — ĝi multe efikos. Ju pli multe ni laboristoj estas devigataj organizi internacie, des pli helpos nin la internacia lingvo, SAT kaj ĝia ĉiusemajna ligilo de solidareco, nia Sennaciulo. Ne sufiĉas krii la devizon "Laboristoj el ĉiuj landoj unuiĝu" almenaŭ kvardeklingve dum la 1-a de majo. Ni devas praktike helpi. Laboru kaj denove laboru!

Mark Starr (488), Londono.



# KOMPRENEMO KAJ PRIPENSEMO

Ni vere povas esti gajaj konstatante la aperon de l' 200-a numero de Sennaciulo.

Ĝia vivado ne ĉiam estis sufiĉe potenca. Bedaŭrinde ĝi estas tro malriĉa por malvolvi ĉiujn siajn kapablojn. Okazas al sociaj organoj tio, kio estas videbla ĉe la individuoj. Se la ekonomiaj rimedoj estas malgrandaj ĉe ia ajn persono, ĝi ne povas disvolviĝi konforme al sia celo. Tute la samo rezultas ĉe la homaj kreaĵoj, kiuj dependas de sia monstato. Ni havas grandajn taskojn, sed ili estas efektivigeblaj nur per volo preskaŭ superhoma. Ni devas alproksimiĝi niajn idealojn dank' al plena unuiĝo de sampensantoj kaj samvolantoj.

Ĝis nun SAT ne transpaŝis severan aplikadon de sia historia rolo. Ĉiu studu ĝian karakteron, ĝiajn taskojn kaj ilian praktikiĝon. Ĉar ju pli edukitaj ni estas, ju pli konsciaj pri vere farota SAT-laboro, des pli bone ni servos kaj utilos la organizon, fidele kaj konstante, senlace. Kiel edukiĝi? Do, precipe, legante la organojn de SAT atente, studante ĝiajn valorajn librojn kaj partoprenante la ĝeneralan vivon de la Asocio. Oni ne forgesu, ke SAT estas superpartia kaj supersindikata; tial ne provu iu ajn enkonduki en ĝi la trajtojn, kiuj karakterizas liajn partion aŭ sindikaton, ĉar SAT plenumas alian rolon esence tre diferencan: SAT celas per aplikado de esperanto influi ĉiujn partiojn kaj sindikatojn klasbatalajn de la Laboristaro; sennaciecigi siajn membrojn kaj unuigi ilin super la partioj kaj sindikatoj por fari komunan laboron utilan al ĉiuj tendencoj.

Kiel ni povus influi sur la grandajn laboristajn amasojn kaj iliajn estrojn sen la eldonado de taŭgaj verkoj kaj gazetoj en sennacieca lingvo? La laboristaj fortoj esperantistaj estas tro malgrandaj por labori dise aŭ izole. Nia devo estas protekti, laŭpove, morale kaj ekonomie la tutan vivon de SAT. Se ni mem ne povas aboni ĝiajn organojn, ni propagandu ilin kaj varbu por SAT novajn fidindajn membrojn. Ni komencu kursojn kaj organizu la SAT-propagandon en la loĝej-regiono.

Vidu, kion atingis SAT post 7-jara vivado? Espereble post la unua jardeko niaj nunaj pozicioj estos pli firmaj kaj novaj estos naskiĝintaj. Sed tion ni atingos nur, se ni funde komprenas nian mision ĉe la unua kaj sola sennacieca organizo tutmonda, porsennaciisma kaj peresperanta . . .

Mi salutas ĉiujn miajn samasocianojn, ĉefe tiujn, kiuj de la komenco restis fidelaj kaj estas sufiĉe kapablaj por kompreni la mision de SAT. Ĝis la morto ni ne devas disiĝi de nia plej amata organizo tutmonda, tiom respektinda kaj meritoplena. Ĉiu faru sian devon, kiel mi plenumas laŭ miaj povoj la mian!

J. Borrell (357), Barcelona.

# INTERKOMUNIKIĜO

Preterfluegis sep jaroj, depost kiam mi ekstudis esperanton, kaj dum tiu periodo mi skribis kaj ricevis multajn poŝtkartojn kaj leterojn, legadis diversajn esperantajn gazetojn kaj revuojn, kelkafoje aŭdis la voĉon de internacilingvano per radio, kaj unufoje mem alparolis, per tiu mirinda eltrovaĵo, nekonatojn en alilandoj. Kaj mi volas fari kelkajn rimarkojn pri miaj spertoj rilate al la interkomunikiĝo.

Unue, la interkomunikiĝo estas multaspekta. En la nuna tempo la homo povas komuniki al siaj kunuloj siajn ideojn, sciojn, dezirojn kaj ordonojn per diversaj rimedoj; per la parolo, telegrafo, telefono, radio kaj la skribo. Ekzistas interkomunikiĝo inter riĉuloj kaj riĉuloj, mastroj kaj servantoj, registaroj kaj registaroj, gazetoj kaj gazetoj, per kodoj, per nacilingvoj, kaj, nur lastatempe, inter laboristoj kaj laboristoj, dank' al internaciaj lingvo kaj poŝto. Ĉar, ne eblis al laboristoj reciproke viziti unu alies landojn por buŝe interparoladi kaj libertempadi, nek utiligi telegrafon, telefonon kaj radion.

La interkomunikiĝo ankaŭ estas diversspeca; amikeca, individua; grupa, kolektiva, kleriga; oficiala, afera, inter organizoj.

Tute nature la ĉefa formo de interkomunikiĝo inter laboristoj diverslandaj estas korespondado per leteroj skribitaj en internacia lingvo, pro sia kompare malalta kosto. De la tempo, kiam esperanto estas unue donacita al la mondo, la korespondado ludadis gravan rolon por la disvastigado kaj konigo de la lingvo mem al la homaro. Poste ĝi fariĝis la interrilatiga rimedo de unuopuloj kaj grupoj havantaj similajn celojn krom la disvastigo de la internacia lingvo. Kaj inter tiuj troviĝas ni, laboristoj, blankuloj kaj nigruloj, brunuloj kaj flavuloj, lokitaj tra la tuta mondo.

Pro kio ni volas interkomunikiĝi? Kial ni korespondadas? Certe ne nur por amuzo. En Anglio oni ofte aŭdas inter amikoj kaj konatoj la diron, "Mi malamegas leterskribadon", kaj tiuj vortoj koncernas nur la enlandan korespondadon en nacia lingvo. Verŝajne do, la skribo de leteroj ne estas per si mem plezuro. Tamen la nombro de leteroj kaj poŝtkartoj traktataj ĉiujare per la poŝto estas grandega. Kompreneble multaj el tiuj komunikaĵoj estas aferaj leteroj de komercistoj, bankoj, ktp. Ĉiuj tiuj estas senditaj nur kun speciala celo, pro difinita kaŭzo, kaj tre malmultaj restas sen respondo.

Denove, kial precize la laboristoj interkorespondadas? Ĉiuj esperantaj gazetoj enhavas du-tri kolonojn pri korespondpetoj. Ĉiuj trovas necese admoni ke "ĉiu petinto havas la moralan devon respondi almenaŭ unufoje". Kaj lastatempe, speciale en nia propra organo, "S-ulo", aperis plendo post plendo, kaj protesto post protesto, pro nerespondo.

Oni devas supozi, ke ekzistas kaŭzo de tiu ĉi malsano. Aŭ la temoj de la korespondado ne estas en si mem sufiĉe interesaj, aktualaj kaj fruktodonaj, aŭ, nerespondo ne kaŭzas al la kulpulo perdon, ĝenon aŭ punon. La morala devigo ŝajne estas tre malforta.

Tamen la korespondado per leteroj internacilingve skribitaj devus esti grava kaj grandskala inter la laboristoj ĉiulandaj. Pripensu la rimedojn de la kapitalistaro por informiĝi, sciigi, kunlabori, mensogi, erarigi; la presaĵojn, taggĵurnalojn milionope legatajn, la lernejojn, preĝejojn, kinon kaj radion. Kaj kion posedas la Laboristaro por ĉion ĉi kontraŭstari, rebati, refuti? Nur kelkajn gazetojn kaj — la korespondadon! Necesas ja eluzi plejeble tiujn du rimedojn.

Korespondado individua inter komencantoj-uzantoj de la internacia lingvo, por pliperfektiĝi, larĝigi la mensan horizonton. Inter spertuloj, pri reciproke interesaj temoj; inter kolektivoj, samprofesianoj, sampartianoj, sportuloj, studentoj ktp. por informiĝo, ideoj, komparo de kondiĉoj; kaj inter organizoj, oficiala korespondado por reciproka, fidinda informiĝo pri grandaj distriktoj, landoj; respondoj al definitivaj demandoj, por helpo kaj kunlaborado.

Jen la ĉefaj flankoj de la internacia korespondado laborista. Kaj, ŝajnas al mi, ke estas nur ĉe korespondado inter organizoj akceptintaj esperanton ke oni povas, kun ia certeco, atendi nepran respondon, kaj eĉ tiam, nur se la leteroj estas direktataj al konvenaj organizoj alilandaj.

Kelkafoje mi ricevis kolektivajn leterojn, aŭ oficialajn, de iu organizo, kiuj tute ne taŭgas por represo en gazeto nek eĉ por laŭtlegado ĉe kunveno, pro tio ke ili estas esprimitaj en vortoj fajraj kaj flamaj, kiuj enhavas nenian signifon por tiu ĉi-landaj laboristoj. Kompreneble, la sendintoj ankaŭ ne scias la specialajn kondiĉojn, kiuj regas en tiu ĉi urbo, marborda banloko, plezurejo, en kiu troviĝas nenia granda peza industrio, kies gazetoj respegulas la konservativemajn opiniojn de riĉaj kaj mezklasaj enloĝantoj. Mi aludas unu-du leterojn de komunistaj organizoj. Nu, mi supozas, ke alilandaj komunistoj bone scias, ke ilia partio estas ankoraŭ relative tre malforta en Anglio, ke ĉi tiu lando estas ankoraŭ neniel "ruĝa", kaj tial ili devus, se ili atendas kontentigan respondon, elserĉi konvenan organizon, al kiu direkti siajn leterojn.

Mi ne estas komunisto, tamen mi ne malŝatas miaflanke ricevi tiajn leterojn, sed kiam oni postulas, ke mi aŭ respondu mem aŭ havigu respondon pere de konvena organizo, mi konstatas malŝparon de tempo kaj energio. Ne ekzistas komunista ĉelo en ĉi tiu urbo, kaj mi ne konas tian, nek ties adreson, tra la tuta lando, krom kompreneble, tiun de la landa sidejo. Verŝajne la komunistaj K-doj alilandaj facile trovos tiun adreson en propraj jarlibroj, adresaroj, oficialaj gazetoj ktp.

Kiam mi ricevis tiajn leterojn, do kion mi devas fari? Unue, fari tradukon anglan, eble pri afero, kiu min ne interesas kaj eble eĉ kontraŭas miajn proprajn konvinkojn, t. e. forpreno de mia tempo. Due, pagi poŝtelspezon por sendi al koncerna landa centrejo; trie, pagi afrankon por sciigi al sendintoj, ke mi tiel agis! Kaj, flanke de la sendintoj, okazas ricevo nur de mallonga sciigo, atendado, fine respondo aŭ — nerespondo, ĉar malofte la leteroj taŭgas por landa centrejo de politika partio.

Antaŭ nelonge kelkaj K-doj sukcesis igi la ĉi-landan Instruistan Laborligon (Teachers' Labour League) akcepti esperanton por alilanda korespondado. Simile al ĉi-loka filio de Sendependa Laborista Partio (Independent Labour Party). Nu, kiaj leteroj estos ricevataj, post kiam aperis nia Jarlibro kun nomoj kaj adresoj de tiuj organizoj?

La unua estas Ligo de batalantaj progresemaj geinstruistoj de ĉiuj laborklasaj tendencoj. Al ĝi konvenas do leteroj de similaj organizoj alilandaj. Tiaj leteroj (se ili trapasos miajn manojn), mi povas promesi mem, ricevos almenaŭ kvitancon. Oficiala respondo kompreneble dependos de nacia Ekzekutiva Komitato. Se mi, kiel koncerna esp.-sekretario, ne ricevas tian, evidente mi ne povos sendi tradukon. Sed tio ne okazos, se la temoj traktataj estos konsekvencaj.

La dua, la ĉi loka filio apartenas al partio socialista, plej "maldekstra" en ĉi tiu lando, sed ne komunista. Tio ne signifas, ke K-doj komunistoj malŝparus tempon sendante leterojn al ĝi, sed ili devus almenaŭ eviti polemikajn esprimojn, ĉu ne? Kaj reciproke.




*La ponto ankoraŭ ne estas larĝa nek finkonstruita. Sed la SAT-anoj tamen sentime jam transpaŝas . . .*

Nia SAT aranĝas Konferencon pri "Pliintensigo de Laborista Kulturo", kaj memevidente la korespondado okupos gravan lokon sur la tagordo. Dum kelkaj jaroj, mi kredas, la korespondado, pro neceseco, estos la ĉefa ligilo inter la Laboristaro ĉiulanda. Sekve ĝi devus esti zorge kaj grandskale organizata, seriozege pritraktata kaj gvidata de kompetentuloj, kiuj profunde konscias pri la pereiga efiko de diletantismo kaj de malsukceso mem.

Rilate al tiu ĉi Konferenco mi volas atentigi la K-daron pri unu stranga fakto. Laŭ informo publikigita en "S-ulo" nur anglaj organizoj aliĝis!! Eble tiu aserto malpravas, mi povas certigi ĝin nur per la citita fonto, ĉar mi ne havas alian. Ĉu oni devas supozi ke neniu alilanda organizo interesiĝas pri la temo de la Konferenco? Mi apenaŭ povas kredi tion.

Mi havas fidon, ke en SAT ni jam posedas aparaton, kiu **nuntempe** kapablas liveri grandan servon al la Laboristaro tutmonda per sufiĉe rapida gazetservo, per tradukservo, per organizo de konstanta fidinda korespondado.

K-doj, nur necesas la konscia volego! Do, volu!

H. Stay, (2978), Bournemouth, Anglio.

## SALUTON AL SENNACIULO EL NORDO

El sia nesto flugas tra la mondo novspeca birdo portante freŝan sciigon pri laborist-proleta vivo el ĉiuj terangulој. Kun fortaj flugilbatoj ĝi transiras la landlimojn kaj atingas eĉ la etenditajn manojn de transmaraj sopirantoj.

En iuj landoj rabobirdoj ĝin provas persekuti, ĉar ne estas konvena proletkleriga entrepreno, kie la plej ekstrema reakcio regas. Sed per la obstino de tieaj kunbatalantoj venkos fine la racio.

Jam ducent-foje Sennaciulo vizitis min, kaj ĝi estas ĉiam tre bonvena. Ĝi plenumis tre fortan deziron ekkoni, kiel vivas kaj pensas samlingvanoj en malproksimaj terzonoj. Sed ĉefe mi vidas en praktika uzado de mondlingvo rimedon por krei interkonsenton kaj harmonion sur la tero.

Eble ankoraŭ ne estas taŭga momento, laŭdi la iniciatintojn, sur kies ŝultroj pezis ĝis nun la taskoj de zorgantoj. Tamen mi opinias, ke utilas diri, ke ni tre ŝatas ilian penadon kaj ke ni ĉiuj pli kaj pli volas kunigi niajn fortojn por pliriĉigi kaj plifortigi nian grandiozan entreprenon.

Do, kuraĝe antaŭen ĝis nova etapo!

Muri (102), Norvegio.

# STUDETO PRI ESTONTA SAT-LITERATURO

Ĉu estas permesate en la tago, kiam aperas la 200-a numero de "S-ulo", ĵeti rigardon antaŭen en la proksiman estonton? Mi opinias, ke la iom-post-ioma disvolviĝo de nia movado kaj de nia semajna gazeto rajtigas nin, ne nur rerigardi sur la atingiton, sed ankaŭ bazante sur la fundamento kreita, konsideri la estontan tempon. Nia tuta laboro ja nur valoras, se ĝi malfermas favorajn perspektivojn por la estonto.

Komencante ĉe "S-ulo" mem, mi volas diri, ke ĝi kiel semajna ligilo inter la SAT-anaro provas, palpante kaj paŝetante, trovi pli kaj pli kun ĉiu jaro la firman, solidan kontakton de leganto al leganto. Ĉar ili ja, kunlaborantoj kaj legantoj estas la portantoj de volo kaj ideo, kiu penetras nian organizon kaj ĝian organon. Ilia kontakta celado kaj agado estas kreadanta iun apartan ideologion. Ofte jam oni trovas nekutimajn liniojn en nia organo, esprimojn tre diferencajn de tiuj, kiujn oni trovas en nacilingvaj proletaj gazetoj. Oni jam trovas pensojn en ĝi, kiuj estas netradukeblaj en iun ajn nacian lingvon[1]). Oni trovas la ekbrilojn de tiu nova spirito, kiu formiĝas per la intima kunlaborado de la legantoj kaj raportantoj, kiuj cerbumas, meditadas kaj ne rigardas kiel ludilon la okupon pri nia lingvo.

Kiel ĉefan taskon de "S-ulo" ni devas konservi en la memoro kaj teni antaŭ la okuloj: ĝi donu fidindan, objektivan, klaran portreton pri laboristaj bataloj kaj vivkondiĉoj en iu regiono laŭ sennacieca rigard- kaj observmaniero. Nur el tio povas rezulti profito por la legantoj en eduka, kleriga senco. La proksima tasko por la gvidanto estas, zorgi, ke pli kaj pli malaperu la artikoloj el la gazeto, kiuj bazas sur la internacieca pensmaniero (en kiu estas edukataj la K-doj per siaj partioj kaj ceteraj organizoj. Li devas zorgi, ke anstataŭu ilin raportoj verkitaj laŭ sennacieca spirito, kiuj peras al la leganto tiun novan pensmanieron kaj edukas lin iom post iom ĝis sennaciuliĝo. Ju pli kreskos la nombro da a k t i v a j, kunlaboremaj SAT-anoj, des pli facila kompreneble fariĝos la tasko de la gvidanto; ĉar la kvalito de la verkotaj artikoloj pliboniĝos, kaj je la dispono de la redaktoro troviĝos ĉiam serio da presindaj, eduke efikantaj ellaboraĵoj.

"La Lernanto", la malgranda senpretenda aldono al "S-ulo", kompreneble ne devas obei al aliaj leĝoj kaj principoj ol ĝia granda frato. Ĝi konsistu el facilaj legaĵoj, kiuj instigu en sama direkto la pensadon kiel "S-ulo". Sed, kompreneble, oni ĉiam konsideru, ke tio ne povas esti la verko de la redaktoro, sed devas esti tiu de la kunlaborantaro. Kompreniĝas per si mem, ke ni devas klopodi, plioftigi la aperon de tiaspeca gazeteto, kaj ĝenerale — pligrandigi "S-ulo"-n kaj plimultigi la aldonojn similajn al "La Lernanto". Bedaŭrinde deziro hodiaŭ ankoraŭ ne efektivigebla . . . Tamen, temas ja nur montri la direkton en tiu ĉi studo.

En "Sennacieca Revuo" la nova spirito de SAT-anoj tre klare montriĝis jam en multaj traktaĵoj, precipe en la literaturaj kajeroj. Ni trovis originalan pens- kaj sentmanieron en versoj kaj prozo, ofte en tia intenseco, ke ni rajtas rigardi en la estontan evoluon de nia literaturo kun konfido.

Sed ni transiru de la revuoj al la libra literaturo. Ni disponas jam hodiaŭ pri kelkaj konsiderindaj volumoj, plejparte tradukoj el verkaro de aŭtoroj kun bonsonaj nomoj. Certe, la tradukoj de gravaj verkoj el la mondliteraturo servas al ni, por konatiĝi kun la ideoj de grandaj pensuloj, kiel Marks, Kropotkin k. a., kaj kun la intuicio de poetoj kaj beletristikaj aŭtoroj. Sed la o r i g i n a l a literaturo estas por ni multe pli grava. Literaturo, kiu kreiĝas en la cerbopensumado de niaj propravicaj K-doj, de tiuj kiuj ĉiutage kunlaboras en SAT, kiuj absorbis la ideojn de SAT kaj kies cerbopensumado estas plena da ili. Tiaj spiritaj produktoj prezentas maturiĝintajn fruktojn de nia semado. Komencoj estas faritaj (Je la nomo de l' vivo, ABC, Petro). Sekvos aliaj verkoj. Tre grava mi taksas la studon de K-do Lanti pri P a t r i o t i s m o, I n t e r n a c i i s m o, S e n n a c i i s m o, kies unua parto aperis en "S-ulo" kaj kies tuto aperos en libroformo. Ĉar ĝi estas science bazita kaj signifas ion absolute novan, originalan, kio ne ankoraŭ estas pritraktita tiel funde en iu nacilingvo. Sed tio estas nur unu konkreta ekzemplo. Same kiel tiu studo povus kreiĝi multaj provoj de (al) sennacieca literaturo (pli malpli sukcesaj). Certe estas, ke 1. ju pli vi legos kaj posedos legindan literaturon verkitan en bonstila esperanto kaj en la spiritostato de SAT, des pli rapide via propra spiritostato adaptiĝos al la novo, kiu kuŝas en la taskaro kaj celo de SAT; 2. ju pli da verkoj estos skribataj en esperanto, plenaj da niaj ideoj, des pli elformiĝos la l i n g v o, maturiĝos kaj akceptos tiujn trajtojn, kiujn ĝi bezonas kiel sennacieca esprimilo je la servo de la emancipiĝanta proleta klaso.

Laŭ tio ni trovus kiel plenumindan taskon de SAT sur la kampo de la literatura kreado, ke ĉi tiu ĉefe ne estu reprodukta (traduka), sed produkta, novon kreanta (originala). Se ni parolas pri praktika aplikado de esperanto, certe tiu vorto por ni SAT-anoj ne havas ĉefe kaj unuavice la signifon de uzado dum vojaĝoj turismaj, por interkorespondado sporteca, interŝanĝo de amatoraĵoj ktp. Por la konsciaj SAT-anoj tiu vorto signifas aktivan kaj persisteman kunlaboron en la kreado de lingva karaktero, kiu estas absolute senigita de naciaj pensmanieroj kaj nacilingvaj modaĵoj, kiu estas sennacieca en sia esenco.

N. B.

[1]) Mi citu kelkajn ekzemplojn: "S-ulo", nuna jaro, pĝ. 228 — efektivigataĵo; pĝ. 267 — nia lingvo estu unuecigilo; pĝ. 301 — nacidefendismo; pĝ. 309 — dogmanoj ne rajtu eniri la SAT-edukejon, . . . la dogmemuloj ne regu; pĝ. 325 — pedanta idismo, ktp. La ideoj esprimataj per tiuj esp. vortoj aŭ frazoj estas facile kompreneblaj por ellerninto de nia lingvo; sed se oni volus traduki ilin alilingven, oni trovus gravajn malfacilaĵojn kaj devus formi kompletajn frazojn, por klarigi unu tian esp. esprimon.

# NIA EDUKILO

Kiam estontaj laboristoj en ĉiuj landoj komencas sian vivbatalon, estas la unua rimarkinda okazaĵo la vizitado de lernejoj. Tie juna homo ricevas unuajn erojn de l' pensoj, tie oni semas en junan cerbon unuajn ekĝermojn de ideoj. Sed, kiel ofte la vivo mem sin prezentas en la realo tute aliel, ol ĝin oni prezentis en la lernejo! Tie oni ĝenerale belparolas pri "dio" kaj "patrio". Tie oni laŭdas la patrion en lumo de naturbelecoj ĝiaj, kaj antaŭ ĉio pro la bataloj de la prapatroj. Tie oni semas en junan menson la religion de naciismo.

Tre ofte la vivo mem por multaj lernantoj pli malpli frue prezentas sian veran karakteron. Kaj tre ofte la juna homido jam dum siaj "oraj junecaj jaroj" tro bone ekkonas la alian flankon de la medalo. Sed malgraŭ tio, tre ofte la semitaj ideeroj ĝermas kaj maturiĝas. Se ne estas tre forta la religio pri "dio", pli forta almenaŭ estas la religio pri "patrio". La homoj sentas kaj konsideras tute natura, ke ili, kvankam ili ĉiam devas luktadi kontraŭ ĉiaspecaj mankoj kaj suferoj, almenaŭ havas patrolandon, kiun ili devas defendi kontraŭ ofendantoj. Tio estas la florado de l' semita patriotismo. Tiaj homoj tre ofte fariĝas anoj de klasbatalaj partioj kaj tamen ne sukcesas serioze pensi pri la frazo, ke "la laboristoj ne havas patrion".

Sed multaj tiaspecaj homoj ricevas oftokaze kardojn inter la patriotisman floraron. Tio okazis ekzemple dum la lasta mondmilito. Tiam falis la vualo de la belaj ideoj, kaj la aferoj ekvidiĝis en sia vera, kruda realo. Tiam la elkreskintaj kardoj sufokis baldaŭ la tutajn belajn revojn pri la patrolando. Tiam komenciĝis pensado pri la frazo

forgesita. Sed la tiele formiĝanta konvinko ja ne estas sennaciismo, sed senkerna internaciismo. Ĉar kvankam malfortiĝas eble la sento por patrio, restas almenaŭ en la cerbo la imago pri landoj, limoj kaj nacioj kiel ia senevita malbono. Sed se tia homo trafas en la retaron de la esperanta movado laborista, li ricevas mirindan kapablon de ekkono. Li ekrimarkas, ke li ankoraŭ troviĝas en stato, en kiu li bezonas edukadon. Li observas ĉe si mem, ke li (aŭ ŝi) en la SAT-organizo alprenas veran kernon por konsistigo de sia mondkoncepto. Li observas, ke lia antaŭa idearo estis kvazaŭ krusto sen internaĵo.

Tio vere okazis al multaj homoj, kiuj nur povas sincere danki al nia Asocio pro ĝia sennaciiga eduk- kaj kulturlaboro. Ili ekvidas, ke ili fariĝas tutmondanoj, ne plu apartenantaj nek pense nek sente al iu nacio.

En tiu nia edukado estas la cefa interligilo kaj instigilo nia semajna organo Sennaciulo, kiu tre bone dum sia ducentfoja aperado montris veran vojon al fina sennaciisma socio. Nia organo estas ankoraŭ juna; sed jam dum tiu mallonga periodo ĝi faris laboron de giganto, ĝi edukis kaj kapabligis la laboristajn esperantistojn en tuta mondo por efike plenumi la taskojn en servo de la proleta klaso. Dum sia ĝis nun trapasita vojo ĝi sukcesis bone, ĝi semis fruktodonan semon. Pro tiu semado ni, rikoltantoj, sennaciece edukatoj, estu dankemaj al nia gazeto Sennaciulo kaj ĝia aktiva kunlaborantaro. K-doj, pli fervore ol ĝis nun, ni grupiĝu ĉirkaŭ ĝi! Ni grupiĝu sub la standardo de sennacieca idealo, ni kolektu ĉiujn niajn fratojn kaj fratinojn, nigrajn, blankajn, brunajn kaj flavajn sub ĝi! Nia Asocio flirtigu sian standardon baldaŭ super la detruitaj landlimoj, super liberigita mondo! Kaj kiam siatempe aperos la kvin-centa numero de Sennaciulo, ĝi estu 100-paĝa kaj havu en la vasta mondo almenaŭ 20 000 abonantojn! Vivu Sennaciulo!

Vojaĝemulo (695), Finnlando.

---

**Gek-doj, atentu! La Kongresafiŝo por nia 8-a ne plu estas havebla.**

---

**Al ĉiuj Soveti-anoj!**

Monon por la Adm. de SAT, ne sendu al Leipzig, sed al nia bankkonto ĉe C. K. de SEU en Moskvo, poŝtkesto, 630. Niaj bankoj ne akceptas sovetian monon. — Adm.

# KIEL JUĜAS LA LEGANTARO PRI "S-ULO"

*Iun tagon, kiam la gvidanto de nia gazeto okaze forestis el sia laborejo, mi trovis en lia tirkesto kajeron kun la surskribo "Opinioj pri Sennaciulo". Ĝi estis tre ampleksa, kaj malfermante ĝin mi trovis surprizite en ĝi almenaŭ centon da leteroj kaj poŝtkartoj de legantoj, kiuj havis la deziron esprimi sian opinion pri "S-ulo". "Ho!" mi pensis, trafoliumante la kolekton scivoleme, "tio estas vere miriga afero, vera ormino!" Estas necese malaperigi tiujn dokumentojn el la kaŝiteco de l' skribtabla tirkesto kaj tiri ilin en la lumon de l' publikeco ..."*

*Mi faris. Espereble K-do Lanti ne grumblos pri mia malkovro, kvankam mi scias, ke li prefere atentas pravajn riproĉajn kritikojn ol laŭdojn. Sed vere siatempe li enmetis jam multajn opiniojn de severaj kritikemuloj en la gazeto — cetere ili kritikis ne pri la stilo, sed nur pri la ofte tro unutona kaj tial neinteresa enhavo, — dum li retenis la laŭdajn kritikojn. Per tio povus estiĝi ĉe legantoj la imago, ke ilia ĵurnalo ne estas tre valora. Kaj bedaŭrinde eĉ estas fakto, ke iuj laboristaj esperantistoj prefere abonas burĝajn esp. gazetojn, ĉar ili opinias, ke tiuj lastaj estas pli bonstilaj, pli imitindaj! ...*

*Tial mi kredas necesa meti en la lumon kelkajn, nur kelkajn malmultajn el la multego da laŭdaj juĝoj ricevitaj el la mezo de nia Legantaro.* N. B.




**1. El juĝoj de nia abonantaro**

"S-ulo estas en viaj manoj. Tio certigas al mi, ke la nombro da abonantoj kreskos. Necesas, ke "S-ulo" estu multe legata — ne nur tial ke ĝi estas la sola esp. proleta organo, sed ankaŭ pro la varieco de ĝia enhavo, ĝia neriproĉebla stilo, ĝia ĵurnalistika vigleco ... Mi havas ĉemane la n-ojn ĝis la 5-a de aŭgusto. Gratulojn! Kiom da progreso! ...

12. 8. 26.

LUCIEN REVO, Leningrad (Sovetio).

—o—

... Mi povas diri, ke la gazeto estas tre interesa kaj praktika por la labor. movado; mi nur tre bedaŭras, ke aliaj multaj esperantistaj laboristoj estas tre malfacile atingeblaj por SAT kaj "S-ulo" ...

21. 9. 1926.

H. GREITNER, Knittelfeld (Aŭstrio).

—o—

... La redaktoro devus esti iu mirakla homo, por povi fari ĉion je ĉies bono ... "S-ulo" iris ĝustan vojon, ĝi iris la oran mezvojon laŭ sia enhavo ...

sept. 1926.

J. KUORIKOSKI, Himanka (Finnlando).

—o—

... La enhavo do laŭ mia opinio nuntempe estas modela kaj tute konformas al la postulo de partia neŭtraleco. Tiu K-do, kiu en unu horo povas senpene tralegi la revuon kaj trovas ĝin pro tio senenhava, mirigas min pro la logiko de tiu ĉi konkludo ...

24. 9. 26.

H. PLATIEL, Landshut (Germanio).

—o—

... Laŭ mi ĉio en la gazeto estas pli malpli interesa ... Mia sola kritiko estas, ke ne troviĝas sufiĉe da bildoj pri okazintaĵoj ...

31. 10. 26.

S. W. BROWN, London (Britio).

—o—

... Mi sentas, ke la SAT-anoj povas fieri pri la gazeto kaj devas danki la K-dojn en Parizo kaj pritaksi ties laboron ...

14. 11. 26.

J. STADLER, Plzen (Ĉeĥoslovakio).

—o—

"S-ulo" pli kaj pli kontentigas min kaj miajn samgrupanojn per enhavo, belaspekto kaj korekta, logika lingvo...

jan. 27.

M. KRJUKOV, Irkutsk (Sovetio).

—o—

... Ĉio interesas, de la fruntartikolo ĝis korespondado!

jan. 27.

J. BORRELL, Barcelona (Hispanio).

... Koncerne enhavon de "S-ulo", ĝi estas tute interesa de la komenco ĝis la fino ...

okt. 26.

S. RIVAL, St. Etienne (Francio).

—o—

... Pri legebleco de la artikoloj ni nenion povas aldoni, ĉar en ĉi rilato "S-ulo" multe superas la gazetojn burĝajn ...

RIGA-GRUPO (Latvio).

—o—

... Pri la ĵurnalo mi povas skribi, ke tre taŭga estas ĝia enhavo, kaj ni ĉiusemajne atendas la ĵurnalon. Ne nur mi, sed ĉiuj K-doj estas kontentaj pri ĝi. Tiel interese estas kompilita la gazeto, kaj vi skribas tiel zorge pri la tutmondaj aferoj, ke mi, eĉ se mi estas laca, ĝojege povas legi ĝin ĝisnokte ...

26. 5. 27.

IU K-DO EL BLANKA LANDO.

—o—

... Mi estas tre kontenta pri la stilo, enhavo de ĉiuj n-oj ĉi-jaraj de "Sennaciulo" ...

majo 1928.

J. PORĈIN, Antverpeno (Belgio).

---

## 2. El juĝoj de neŭtraluloj

*Pli valoraj ol la antaŭaj ŝajnas al ni iel tiuj ĉi opinioj de esperantistoj el kontraŭula tendaro. Ĉar certe tiuj personoj ne juĝas laŭde pro simpatio al nia ĵurnalo, pro komplezemo. Ili juĝas pro objektivaj konsideroj:*

... Kiel profesia ĵurnalisto, mi povas sincere vin gratuli pro la bone redaktata gazeto via, en kiu ofte mi trovas sciigojn ne alie troveblajn ...

29. 10. 26.

Pastro RAMBOUX, Paris (Francio).

—o—

De tempo al tempo alvenas ĉe mi tiu bonega gazeto "S-ulo"; bela, interesa kaj multvalora por la tutmonda esperanta movado kaj vivo de nia komuna idealo. Mi estas ĵurnalisto kaj kiel tia mi deziras al vi kaj al via revuo grandan prosperon ...

15. 1. 27.

PEDRO CASAS, Deleg. UEA, Montevideo (Urugvajo).

—o—

... "S-ulo" enhavas ja multinteresajn artikolojn tre viglajn. Legante ĝin mi sopiras havi tian materialon por Espero Katolika...

El "ESPERO KATOLIKA", jan. 1927.

... Iam, la SAT-gazetoj eble estis riproĉeblaj de lingva vidpunkto; sed de longe ili konstante pliboniĝadas, kaj nuntempe ... ili estas inter la plej modelaj kaj fierindaj ...

M. C. BUTLER, Kingston-on-Thames (Anglio), L. K.-ano en "Fideleco", marto 1928.

★

## La instigo de nova SAT-ano

Permesu al mi, K-doj, interdividi kun vi sur la paĝoj de "S-ulo" miajn malriĉajn impresojn pri nia gazeto, kun la antaŭsciigo, ke mi estas nur simpla, malsperta leganto de "S-ulo".

Estas malĝojige legi preskaŭ en ĉiu n-o de "S-ulo" pri tro mizera eldonkvanto de nia gazeto. Min tre mirigas la malalta nombro da abonantoj. Kiu ne legas la gazeton, tiu estas neinformita pri la laborista esperantista movado. Do li estas senutila ano, li estas senviva por la movado kaj anstataŭ propagandi la internacian lingvon, li efikas malinstige por la aliaj anoj. Tiaj anoj (kiujn en Sovetio oni nomas: papera anaraĉo) estas por SAT danĝeraj.

Tial mi proponas al ĉiuj gvidantoj de SAT-rondetoj ktp., kie troviĝas anoj de nia Asocio, ne abonantaj la gazeton, influi kaj konvinki ilin, ke ili abonu. La abonpago ja estas vere sufiĉe malalta eĉ por plej malbone pagata laboristo kaj malriĉa kamparano. Nur per aktiva agado de la gvidantoj de esp. lab. grupoj kaj rondetoj kaj iliaj plej agemaj anoj estos eble efike instigi la pli malviglajn K-dojn kaj certigi al nia gazeto plian alfluon de legantoj, tiel ke ĝi havos ne nur 4000 abonantojn, sed ĝisatingos la nombron 8000. Per tio ni ne nur materje helpos al SAT, sed edukos plej konsciajn sennaciulojn, efikajn kaj agemajn kontraŭulojn al ĉiuj patriotaj militoj.

Gvidantoj, aktivuloj, nur de vi dependas la plenumo de tiu ĉi grava laboro. Oferu eron da energio kaj la venko estos kun ni!

T. Berejnoj (10494), Kalaĉ, Sovetio.

---

**SE NIA ABONANTARO ESTUS DUOBLE PLI GRANDA, OL ĜI ESTAS, NI POVUS LIVERI AL LA LEGANTOJ ĈIUSEMAJNE KAJERON KIEL TIUN ĈI.**

---


Ne hontu montri vian esperantistecon kaj SAT-anecon!

**PORTU LA INSIGNON DE SAT!**

La insigno estas ekkonilo kaj varbilo.

**La granda insigno**
diametro 18 cm. kostas 0,80 mk. g.

**La malgranda insigno**
diametro 12 cm. kostas 0,60 „ „

**La malgranda insigno**
por ne SAT-anoj . . . 0,60 „ „

**Haveblaj ĉe Administrejo de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.**


**ENCERBIGENDAJ VEROJ**

**La kapitalistaro tenas en servuteco la Laboristaron. Kaj tia stato ĉefe rezultas el tio, ke la granda plimulto da laboristoj legadas la gazetojn eldonatajn de la kapitalistoj.**

**La esperantista movado ne progresas proporcie kun la disvendiĝo de lernolibroj, ĉefe pro tio, ke la esperantistoj ĝis nun ne komprenis la rolon kaj signifon de la esperantlingva gazetaro.**

**Kiam vi varbis unu abonanton al SENNACIULO, tiam vi pli utilis al la laborista esperanta movado, ol kiam vi disvendis dek lernolibrojn.**


★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★

## La plej bona rimedo por subteni esperanton

★

*— Mi volonte aĉetus SAT-librojn, se mi havus tempon por legi ilin...*

*Ne malofte oni povas aŭdi tian diron el la buŝo de fervoraj K-doj, ĉiam pretaj malavare donaci por la esperanta propagando.*

*Se tiuj K-doj iom pripensus, ili baldaŭ konvinkiĝus, ke la plej certa, la plej fruktodona subteno al esperanto estas ebligi la pliriĉigadon de SAT-Biblioteko.*

*Lingvo estas ja vivanta laŭproporcie je la verkoj en ĝi publikigitaj.*

*Ju pli ekzistas esperantaj verkoj, des pli facila estas la poresperanta propagando.*

*Libro estas fakto, K-doj! Aĉetu do la SAT-librojn, eĉ se vi ne havas tempon por legi ilin.*

| | Prezo mk. g. |
|---|---|
| **Nur Volu,** Izgur | 0.70 |
| **For la Neŭtralismon,** Lanti | 0.30 |
| **Eklumo en Abismo,** H. Barbusse (broŝ.) | 0.80 |
| **Malgranda Terbiblio** (Prolet. Atlaso), Szeréni | 1.80 |
| **Proletaria Kantaro** (74 kantoj kun notoj) | 2.50 |
| **El la Mondbildo de l' Nova Fiziko,** Muravkin | 0.60 |
| **La Kemio de la Universo,** Fersman | 0.60 |
| **Sekspsikologio** de S. Ziegler | 0.60 |
| **La Morto de Blanjo,** Jean Tousseul | 0.60 |
| **Ruĝo kaj Blanko** de L. Ivn | 0.60 |
| **La Komunista Manifesto** (2-a eldono) | 0.60 |
| **Dokumentoj de Komunismo** | 1.— |
| **Etiko** de P. Kropotkin | 1.80 |
| **ABC de Sennaciismo,** V. Elsudo | 0.50 |
| **Orienta Blovo** | 0.40 |
| **En Katenoj de la Maljusteco** | 0.60 |
| **Ni Legu!** Brunulo. (Internacia Legolibro) (3-a eldono) | 1.— |
| **Petro,** kursa lernolibro laŭ parola metodo | 0.70 |
| **Labor-Kajero al Petro** | 0.30 |
| **Karl Marx, Lia Vivo kaj lia Verko** | 0.60 |
| **Ŝtato kaj Revolucio,** Lenin | 1.— |
| **Je la Nomo de l' Vivo,** E. Izgur. | 2.— |

La prezoj kompreniĝas inkluzive sendkostoj

*

**Richard Lerchner**
**Leipzig O 27, Colmstrasse 1**
Poŝtĉek-Konto 6835

★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★

# RAPORTO DE LA GVIDANTO DE SENNACIULO

K-do E. Lanti

*Tiu raporto estis verkata por esti legota ĉe la 8-a Kongreso. Sed la legantoj certe konsentos, ke ĝi ankaŭ taŭgas por ĉi tiu jubilea numero.* *Red.*

Via gazeto aperis akurate. Ĝi akiris en la interkongresa jaro 635 novajn abonantojn. K-doj, kies skribaĵoj ne aperis aŭ prokrastiĝis, estis... malkontentaj. Ne estas nia kulpo, se "S-ulo" estas ordinare nur okpaĝa. Aperis 369 originalaj artikoloj kaj 73 tradukoj. En la nombro de originaloj ne estas enkalkulitaj la mallongaj notoj. Se vi legis ĉiujn n-ojn, vi do povas jam havi opinion pri la semajna organo de SAT. Se ne ĉiuj artikoloj estis interesaj, kulpas en tio la verkintoj mem. Por elekti, mi ne ĉiam ricevis valorajn manuskriptojn. Preskaŭ ĉiuj manuskriptoj estis de la Redaktoro, K-do Barthelmess, lastatempe prilaboritaj, senbalastigitaj kaj maŝine kopiitaj. Kiam la manuskriptoj entenas interesajn faktojn kaj ideojn, la rezulto de tia prilaborado povas esti bona. Sed se estas nur banalaĵoj kaj sensignifaj faktoj, plej lerta redaktoro ne kapablus eltiri el tia materialo interesan artikolon. Bakisto ja ne povas fari panon, se mankas al li faruno, akvo kaj cetero. Nia gazeto pliboniĝos, rilate la enhavon, nur kiam ni havos en ĉiuj regionoj de l' mondo kapablajn, seriozajn, akuratajn, — spritajn kunlaborantojn. Ni ja ne malpermesas al niaj korespondantoj, ke ili verku amuze, pike, acide...

Ni ne ricevis plendojn pri enhavo kaj stilo[1]).

Finita estas mia raporto. Ĝis la revido, Gekamaradoj! Fartu bone!...

Tiel mi povus per tiuj kelkaj vortoj prezenti raporton pri nia semajna gazeto. Mi ja diris ĉion esencan kaj gravan. Mi timas tamen, ke tia konciza kaj seka maniero ne plene kontentigus vin. Mi devas do trovi ion alian por priparoli. Sed kion? Mi konfesas, ke mi povas nur ripeti sub eble alia formo, kion mi jam diris en antaŭaj raportoj.

Multaj bonvolaj kunlaborantoj ne komprenas la karakteron de nia gazeto. Ili tro ofte malatentas, ke ĝi estas legata en la tuta mondo kaj sekve, ke la artikoloj, kiujn ili sendas, bezonas kelkokaze semajnojn por atingi la redaktejon, ke inter la ricevo de la manuskripto ĝis la tago, kiam la koncerna n-ro atingos la legantojn, en Japanio, Ĉinio, Ameriko, Sud-Afriko aŭ aliaj landoj malproksimaj de la Administrejo, pasos ankoraŭ kelkaj semajnoj, eĉ monato. Ĉiu do devas neniam forgesi, ke inter la sendo de artikolo kaj ĝia legado flanke de kelkaj abonantoj preskaŭ tri monatoj povas forpasi. Sekve artikoloj, kies ĉefa valoro estas la aktualeco, fariĝas en tia okazo tute senvaloraj. Pro tio ni kelkfoje ne uzis ricevitan materialon.


Niaj kunlaborantoj devas celi montri la ĝeneralan soci-politikan staton de sia regiono, kiel ĝi estis, ekzemple, dum sesmonata periodo. Ĉiuj sensaciaĵoj estas por "S-ulo" — sensencaĵoj. Estus ja sensence kaj ridinde, se nia malgranda, semajne aperanta gazeto celus ludi rolon de ĉiutaga ĵurnalo...

---

[1]) Krom de K-do Goldfeder el Barnaul-Siberio. Ni emas pensi, ke la juĝo de tiu K-do ne estis tre objektiva. Li ja skribis en momento, kiam li estis malbonhumora pro neapero de kelkaj liaj skribaĵoj. Al tiu unika kritiko pri la stilo de nia gazeto ni povas kontraŭmeti la opinion de s-ro M. C. Butler, eldiritan en cirkulero dissendita antaŭ kelkaj monatoj por kritiki la lingvaĵon de "Esperanto" de UEA.:

"Iam, la SAT-gazetoj eble estis riproĉeblaj de lingva vidpunkto; sed jam delonge ili konstante pliboniĝadas, kaj nuntempe ili estas inter la plej **modelaj** kaj **fierindaj**..."

Estas aliaj korespondantoj, kiuj forgesas, ke "S-ulo" ne estas partia aŭ tendenca organo, kies celo estas kontraŭbataladi konkurencajn partiojn aŭ tendencojn. Pro tia forgeso okazas, ke ni kelkfoje ricevis ankaŭ ne uzeblan materialon. Tamen estas konfesinde kaj ĝojige, ke ni ricevis nunjare malpli da partiecaj, polemikaj artikoloj ol antaŭe. Kredeble la SAT-anaro komencas kompreni la ĝustan karakteron de nia Asocio, de nia gazeto. Mi esperas, ke finfine troviĝos en SAT sufiĉe da K-doj, kapablaj elekti temon interesan kaj instruan por tutmonda, diversopinia Legantaro. Tio estas nepra kondiĉo por la sukceso de nia afero. Se nia movado ne sukcesos pli kaj pli diferenciĝi de ĉiuj




*Kresko de la abonantaro*

aliaj; se ĝi ne povos akiri propran karakteron, havi originalan fizionomion, nu, vanaj estas niaj penoj; vane ni elspezas monon kaj energion...

* * *

Abunde ni ricevis materialon por la rubriko: "Tago el mia vivo". Manuskriptoj devis atendi dum pli ol ses monatoj sian apervicon. Ni ja havis kiel regulon enmeti nur unu "Tago"-n en ĉiu n-ro. Legantoj plendis, ke kelke da tiaj priskriboj estis iom tedaj, grizaj, tro similaj unuj al aliaj kaj finfine fariĝis nelegindaj. Pro tiuj plendoj, ni decidis estonte ankaŭ fari elekton en tiu materialo kaj aperigi nur la plej bonajn kaj originalecajn "Tagojn"...

Lastan jaron ni instigis al verkado de: "Mia buĝeto". Por tiu rubriko ni ricevis malmulte da materialo. Ĉu niaj legantoj malemas konigi sian bonstaton? Ĉu ili timas esti nomataj etburĝoj de K-doj tute senhavaj? Estas ja relative multaj SAT-anoj, kiuj posedas ĉu kapitaleton, ĉu domon; kelkaj eĉ havas aŭtomobilon. Sed tion ili ne konsentas konigi. Kaj sekve ni fanfaronas, asertante, ke la SAT-aparato ebligas al ni esti ĝuste, objektive informataj pri la stato kaj vivkondiĉoj de la laboristoj en la tuta mondo!... Eble "Tago el l i a vivo", "L i a buĝeto" havus pli da sukceso... Kiuj ne konsentas priskribi sian propran situacion, tiuj eble volonte konigus tiun de sia najbaro, sampoziciano...

Almenaŭ ne estas dubo, ke la komparo de diversaj "buĝetoj" el multaj landoj ebligus ricevi sufiĉe objektivan kaj precizan scion pri la vivkondiĉoj de la laboristoj en la Mondo.

Oni ne kredu, ke tia scio estas sensignifa kaj ne utila. Okazas ofte, ke laboristaj gvidantoj eraras en sia taktiko, en siaj direktivoj, precipe tial ke ili ne ĝuste estas informitaj pri la vera situacio de la laboristoj. Plej vigla kaj flama agitado por krei revolucian movadon ne sukcesas, se mankas objektivaj revoluciaj kondiĉoj. Agitado ne ĉiam signifas agadon. Multe da energio iafoje perdiĝas senrezulte. Kiu kontraŭflue naĝas, tiu povas elspezi multe da energio nur por resti ĉe la sama loko. Ni devas esti ĝuste informataj, por ĉiam havi realan kaj ne fantazian bildon pri perspektivoj revoluciaj. Al tia informado povas modeste helpi "S-ulo", se niaj korespondantoj estas seriozaj, observemaj kaj veremaj. Ili ja ne havas motivon por erare raporti; ili ne estas en la pozicio de pagataj agitistoj, kiuj nepre volas pravigi la elspezon de la mono, kiun ili ricevas kaj tiucele sciigas al superaj instancoj, ke la "amasoj radikaliĝas" ktp. dum fakte tio — bedaŭrinde — ne okazas...

* * *

Eble nun mia raporto fariĝis tro longa. Kaj ĉu vi ne opinios, ke nia semajna gazeto ne estas tre valora? Mi ja ne penis por montri ĝiajn bonecojn. Eble mi estas la plej severa kritikanto anstataŭ esti ĝia defendanto. Jes, mi silentis pri la multaj laŭdaj leteroj, kiujn ni ricevis. Estas K-doj kiuj sopiras la tagon, kiam ili ricevos la gazeton. Kompreneble tio estas kuraĝiga, kaj ni ne parolus sincere, se ni dirus, ke tiaj aproboj lasas nin tute indiferentaj. Mi tamen povas tute sincere deklari, ke ni pli atentas lojalan, motivitan kritikon ol nuran laŭdon. Sed kompreneble la kritikantoj devas proponi rimedojn por forigi la mankojn. Mi esperas, ke inter la kongresantoj troviĝas kelkaj tiaj kritikantoj.

Se ni komparas la staton de "S-ulo" kun tiu de aliaj esperantaj gazetoj, ni ja povus esti kontentaj. Sed se oni konsideras, ke ne eĉ la duono el la SAT-anoj abonas, ni ankaŭ havas motivon por nekontentiĝi. Nia movado prosperos kaj plifirmiĝos proporcie kiel pligrandiĝos la nombro de la legantoj de "S-ulo". Ĝi estas la forto, la motoro de SAT. Kaj ĉiuj niaj zorgoj devas celi la bonan funkciadon de tiu motoro kaj ĝian plipotencigon. Ni ja varbis atentindan kvanton da novaj abonoj. Tamen, ni estas konvinkitaj, ke ni jam povus atingi la kvaran milon, se ĉiuj K-doj konscius kiom gravas por nia movado la disvastiĝo de nia semajna organo. Se "S-ulo" ne taŭgas, la Kongreso devas voĉdoni pri ŝanĝo de ties gvidanto kaj redaktoro; sed, se la ĝisnuna aranĝo de nia gazeto trovas vian aprobon, ni devas nepre trovi rimedojn por pligrandigi la nombron de abonantoj.

Mi parolu malkaŝe kaj sincere: ĉiujn miajn liberajn horojn mi dediĉas al nia komuna afero jam de preskaŭ 10 jaroj; sed kelkfoje mi sentas malkuraĝiĝon ĉe la konstato, ke nia movado ne kapablas ankoraŭ havi gazeton kun 10 000 abonantoj. Kaj tamen mi estas konvinkita, ke tio estas jam nun ebla. Sufiĉus por tio ke ĉiu esperantista laboristo konsciu pri la graveco kaj la granda signifo de gazeto por iu ajn movado. Se "S-ulo" havus 10 000 abonantojn, ni povus duobligi ĝian amplekson kaj ĝin liveri por la sama prezo; aŭ ni povus malaltigi la prezon. Mi insiste petas al la Kongresanoj, ke ili esploru pri rimedoj kapablaj akceli la disvastiĝon de "S-ulo", kapablaj fari, ke ni ne tute senkuraĝiĝu...

# AL ZAMENHOF[1]

*Vi dormu trankvile, sincera amik',*
*En tombo post longa laboro:*
*Neniam forgesos vin mondo, kaj vi*
*Eterne vivados en koroj!*
*Ripozu trankvile, ĉar kreskas afer'*
*De lingv' esperanto en mondo:*
*Diskreskas arme', kvazaŭ el-sub la ter'*
*De novaj luktantoj — SAT-rondo!*

*Mondlingv' esperanto dum longa la temp'*
*De burĝoj nur estis uzata.*
*Sed venis per lingvo la nova printemp':*
*Ribelas popol' subpremata,*
*Kaj por la batal' kontraŭ burĝa soci'*
*Nun uzas ĝin la Proletaro.*
*Proletoj korektas faritajn de vi*
*Dum via laboro erarojn.*

*Vi volis atingi feliĉon de l' hom'*
*Per vojo de l' paco kaj bono,*
*Sed al la feliĉo ni venos nur per*
*De l' kantoj batalaj la sono.*
*Kaj kun la standardoj de klasa batal',*
*Tenante pafilojn en manoj,*
*Deĵetos ni jugon de la Kapital',*
*Forpelos por ĉiam tiranojn!*

*Ho dormu trankvile, grandega aŭtor',*
*Neniam pereos l' Afero;*
*Kaj baldaŭ ekbrilos la ruĝa aŭror',*
*Leviĝos la sun' super tero . . .*
*Disfalos la limoj de ĉiu naci',*
*Krakante, rompiĝos la baroj . . .*
*Kaj tiam en nova komuna soci'*
*Fratece kuniĝos Homaro.*

S A T - a n o (5296).

[1]) Por kantado estas uzebla la melodio de "Funebra Marŝo" (vidu "Prol. Kantaro", pĝ. 84).



## ĈU ZAMENHOF EKZISTIS?

Ni ricevis jenan leteron:

"Estimata Redakcio,

Pardonu al mi, sed burĝa esperantisto instruis min pri esperanto, tial ke en nia urbeto ne ekzistas ankoraŭ laborista grupo. Tiu mia instruisto ofte rakontis pri iu malriĉa okulisto, nomita Zamenhof, kiu liadire elpensis la universalan lingvon, nian ŝatatan esperanton. Verdire la fakto, ke okulisto elpensis lingvon, ĉiam ŝajnis al mi iom stranga. Sed tiutempe mi ne havis seriozan motivon por suspekti, ke nia burĝa instruisto rakontis nur fabelojn.

Nu, antaŭ nelonge SAT-ano prutedonis al mi malnovajn n-ojn de 'S-ulo', kaj tie mi legis, ke 'lingvo universala estas produktaĵo de l' kapitalismo' kaj ke ĝi 'sin turnas nun kontraŭ sia kreinto'.

Mi ne plu scias kion opinii pri la afero. Ĉu do Zamenhof simple estas mito? Ĉu la burĝa instruisto trompis nin? Mi emas pensi, ke jes kaj tre koleras kontraŭ li. Honton al la fabelrakontantoj!

Mi ne ĝuas animtrankvilecon, ĝis mi havos la certecon, ĉu jes aŭ ne Zamenhof ekzistis? Mi petegas vin skribi ion



pri la afero en "S-ulo". Se tion vi faros, mi certe abonos vian gazeton."

M a l k r e d e m u l o.

Ĉar nia korespondanto promesas aboni al "S-ulo", ni ne povas rifuzi helpi al la trankviligo de lia animo. Verdire la afero estas tre embarasa. Ni ne povas aserti, ĉu vere Zamenhof ekzistis, tial ke persone ni neniam lin vidis. Cetere, estas bone konata fakto, ke homoj kelkfoje havas viziojn. Sekve tiuj, kiuj asertas, ke ili vidis kaj parolis kun la aŭtoro de esperanto, estas eble nur viziuloj. Kredo estas iarilate necesa. Ĉu estas pli saĝe k r e d i, ke la kapitalismo produktis esperanton, aŭ ke Zamenhof elpensis ĝin? Pri tio ni ne volas decidi: ĉiu kredu laŭ sia kred- aŭ malkredkapablo. Ni nur estas certaj, ke la jenaj diroj estis publikigitaj kun la subskribo de Zamenhof kaj ke la ĉi apuda portreto iomete similas la bildon, kiun prezentas al si la homoj kredantaj, ke ili vidis la Majstron.

---

**La "Fundamento de Esperanto"[1]) devas troviĝi en la manoj de ĉiu esperantisto kiel konstanta k o n t r o l i l o, kiu gardos lin de deflankiĝo de la vojo de unueco.**

**L. L. Zamenhof.**

[1]) Mendebla ĉe nia Administrejo.

## Letero de D-ro Zamenhof

Kara Sinjoro, — Al via demando mi povas respondi jenon: En la unuaj jaroj de esperanto troviĝis diversaj personoj, al kiuj tio aŭ alia en la lingvo ne plaĉis. Ĉiu el tiuj personoj postulis, ke mi nepre faru en esperanto tiajn aŭ aliajn ŝanĝojn. Sub la konstanta bombardado de tiuj personoj mi fine cedis, kaj en la jaro 1894 mi publikigis en la tiama gazeto E s p e r a n t i s t o projekton de diversaj reformoj en esperanto. (En tiu projekto mi forigis la supersignojn, la akuzativon, la deklinacion de la adjektivoj, la neromanajn vortojn ktp.

Sed baldaŭ montriĝis, ke tio, kio en la teorio ŝajnis bona, en la praktiko n e n i o n t a ŭ g i s, kaj ĉiuj reformistoj kaj malkontentuloj ekkriis, ke la proponitaj reformoj nur m a l b o n i g u s la lingvon (ĉar al ĉiu plaĉis nur tio, kion l i proponis). Tiam mi aranĝis voĉdonadon inter ĉiuj tiamaj esperantistoj; kaj ili decidis, ke oni faru en esperanto n e n i a j n reformojn. De tiu tempo ni jam ne parolas pri reformoj. Via L. Z a m e n h o f.

P. S. — Via granda batalado kontraŭ la diversaj projektoj de novaj lingvoj ŝajnas al mi tute superflua, ĉar laŭ mia opinio vi batalas kontraŭ fantomoj. Ili dissendas leterojn al diversaj personoj kiuj k o m p r e n a s l a p l e j g r a v a j n e ŭ r o p a j n l i n g v o j n kaj poste ili trumpetas al la mondo, ke tiuj personoj tuj komprenis iliajn leterojn pli ol leterojn en esperanto. Sed tio ĉi estas ja nur trompa iluzio, kiun multaj personoj bedaŭrinde ne rimarkas, sed kiu tuj aperos, kiam oni volos l e r n i ilian "lingvon". P o l i g l o t a j personoj facile komprenos ilin ankaŭ se ili skribos a n g l e, f r a n c e, aŭ l a t i n e; sed ĉu kolekto da vortoj kompreneblaj por poliglotuloj estas l i n g v o kaj povus servi al la t u t a m o n d o ? — Pri unu nutraĵo oni diras, ke inter siaj aliaj bonaj ecoj ĝi estas ankaŭ facile digestebla. Tiam aperis persono, kiu ekkaptis la vorton "digestebla" kaj diris: "Mi tuj donos al vi nutraĵon pli bonan." Li prenis simplan akvon, enmetis en ĝin iom da suko, donis ĝin al diversaj s a t a j personoj kaj demandis ilin: "Ĉu mia nutraĵo ne estas multe pli digestebla ol tiu?" Kaj kiam li ricevis la respondon "jes", tiam li trumpetis al la mondo, ke lia nutraĵo estas la plej bona. Sed baldaŭ venis infano m a l s a t a kaj provis tiun nutraĵon, kaj tiam ĝi kun kolero ekkriis: "Jes, via nutraĵo estas digestebla, sed ĝi ja tute ne estas n u t r a ĵ o !" Nur tiam la homoj rimarkis, ke por ke ia miksaĵo estu nutraĵo, ne sufiĉas ke ĝi estu nur digestebla por satuloj, — ĝi devas antaŭ ĉio esti n u t r a.

L. Z a m e n h o f.

## *INTER NI*

*Antaŭ nelonge K-doj el Sovetio sendis al mi leteron kun peto ĝin transsendi al H. Barbüs (france: Barbusse). En tiu letero mi legis, ke la fama aŭtoro "unuigis la laboristajn esperantistojn el la tuta mondo". Tiu informo cetere aperis en ruslingva gazeto, kies eltranĉaĵo akompanis la leteron.*

*Tiel estas skribita la Historio! . . .*

*La afero eble okazis iun nokton, kiam mi dormegis; aŭ iun tagon, dum kiu mi ne aĉetis la gazeton, en kiu aperis la informo. Pro tio kredeble mi ne estis informita pri la okazintaĵo! . . .*

*Mi nur scias, ke Barbüs provis unuigi mondskale la revoluciemajn verkistojn — kaj plene fiaskis! . . . Estis ja antaŭ kelkaj jaroj sufiĉe ofte kaj detale raportite, eĉ en esperantaj gazetoj, pri la movado "Klareco". Vane hodiaŭ oni serĉus vivsignon de tiu entrepreno . . .*

*Barbüs eldiris tre flamajn kaj laŭdajn parolojn pri esperanto. Sed bedaŭrinde li ne lernis ĝin kaj neniam verkis eĉ malgrandan artikolon en la internacia lingvo. Nuntempe li estas direktoro de nove aperanta gazeto: Mondo. Kelkajn n-ojn mi havis en manoj. Sed vane mi serĉis plej malgrandan noton pri la esperanta movado.*

*Ĉe tia konstato mi emas pensi, ke nia famulo iel similas la pastrojn, kiuj predikas amon, modestecon kaj ĉiujn aliajn virtojn, sed kondutas mem malame, fierege, malfrate kaj ĉiurilate — fie . . . Ĉu do la laŭdado de esperanto estis por li nur rimedo por akiri pli da famo, pli da populareco? Estas ĉagrene tion pensi. Sed homo, kiu patose parolas, ke la* **unua** *devo de ĉiu internaciisto estas lerni la internacian lingvon, kaj mem ne plenumas tiun devon, ne povas esti konsiderata kiel seriozulo kaj fidindulo.*

*La anoj de la multaj esperantistaj grupoj, kiuj elektis Barbüs-on sia honora prezidanto, preĝu al la animo de Zamenhof, por ke li ne estu tro rigora kaj akceptu la pekulon en la Paradizon de Esperantio post lia morto . . .*

*H. Barbüs estis ankaŭ la honora prezidanto de la 1-a SAT-kongreso. Tiutempe oni povis esperi, ke li lernos la lingvon. Tion li ne faris, kaj hodiaŭ oni rajtas pensi, ke la laboristaj esperantistoj honoris la famulon, sed ne la famulo ilian movadon.* E. L.

---

**SAT-varbantoj, atentu!** Ĉu vi estas pretaj disvastigi tiun ĉi numeron inter la ne-abonantoj por celo de vendo kaj varbado? — Se jes, do mendu tuj la bezonatan kvanton da ekzempleroj ĉe la Administrejo, R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig. Escepte ni vendas ĉi n-on por **0.20 mk. g.**

# Du neordinaraj tagoj el studenta vivo

### Unua tago: Sabato

Mi vekiĝas je la 8-a. Du miaj K-doj samĉambranoj (ankaŭ studentoj) ankoraŭ dormas. Restante en la lito, mi legas freŝan n-on de la loka tagĵurnalo, ĵus alportitan, kaj kun ĝojo trovas en ĝi presitan tradukon de la salutletero al Ruĝarmeo, senditan esperantlingve al nia SAT-grupo el Aŭstrio. Dume miaj K-doj vekiĝis, kaj ni kune ellitiĝas, ordigas la ĉambron, lavas nin kaj je la 9-a rapide disiras al la lekcioj. Dumvoje mi trinkas lakton en ĉina butiko kaj babilas kun la butikisto ĉinlingve.



Ĉe la universitato ni studas multajn lernobjektojn: anglan kaj ĉinan (parolan kaj skriban) lingvojn, historion de la klasbatalo, politikan ekonomian, militarton ktp. Sed la plej intereso okazas en jenaj lecionoj:

G e o g r a f i o d e O r i e n t a A z i o: Hodiaŭ la instruisto petas nin, prezenti al ni, kvazaŭ ni estus "Ŝtata plankomitato de la estonta Ĉinio", kaj petas nin pridiskuti projektojn de la fervojoj tra tuta Ĉinio, prezentitajn de li, je la vidpunkto geografia kaj ekonomia. Estiĝas varmega, interesa diskuto! Tio estas efektive bonega instru-metodo! . . .

P o l i t i k a e k o n o m i o: Ni memstare studas (kun granda intereso) kaj prilaboras la "Kapitalo"-n kaj aliajn librojn. La profesoro nur resumas niajn sciojn per mallongaj interesegaj lekcioj.

Fine okazas tre interesa leciono de tre gaja kaj juna ĉina instruisto, per natur-parola metodo instruanta al ni ĉinan parolon. Li rakontas al ni historiojn, demandas nin pri nia vivo, kaj ni ĉiuj kune ridegas kaj gajas! . . .

Tiel ni, orientanoj, lernas! . . . Post la lecionoj, je la 3-a horo, mi tagmanĝas en privata hejm-manĝejo, kaj poste mi venas hejmen, okupiĝas pri ĉinaj hieroglifoj kaj gramatiko, skribas tezojn por mia morgaŭa raporto ĉe la SAT-grupo, kaj fine je la 6-a mi iras en klubon por aŭskulti raporton organizitan de "Societo de dialektika materialismo" (kies membro mi estas). La raportanto-profesoro komparas la ĉefajn ekonomiajn kategoriojn de kapitalismo kaj de Sovetia mastrumo ("necesa" kaj "superflua" produkto kaj valoro). La raporto estas bonega, profunde klarigas al ni la socialisman esencon de Sovetia Ŝtat-industrio, elvokas viglegan diskuton, kiun grave partoprenas la gestudentoj. La diskuto ne finiĝas dum ĉi tiu vespero kaj estas prokrastata.

Je la 9-a mi denove marŝas al la Universitatejo. Tie, en apartaj ĉambroj (kie ordinare funkcias la studenta "tetrinkejo" kaj "ruĝa anguleto"), okazas vesperfesto de nia I-a kurso de Orienta Fakultato (kun celo: amikigi ĉiujn gestudentojn inter si). Tiu vespero estas vere neforgesebla! Ni estas ĉ. 50 Gekamaradoj: ĉiuj samkursanoj plus du plej ŝatataj profesoroj. Komence (sen ajnaj antaŭaj preparoj) K-doj laŭvice elpaŝas kun deklamado (mi deklamas esperante), anekdotoj, pian- kaj violonludo, dancoj. Knabinoj elpaŝas kun dancoj kaj kantado! Poste sekvas intermiksite tetrinkado, viglaj ludoj, dancoj kaj ĥorkantado. La profesoroj ĉie partoprenas, ili estas ravitaj. Aliaj legas gazetojn, revuojn, ludas ŝakon, "Viktorinon" (demandludon faman en Sovetio) ktp Neniu rimarkas, kiel flugas la tempo! Nur je la 4-a horo nokte oni rememoras, ke necesas dormi, kaj disiras hejmen.

La printempa stelplena ĉielo gaje brilas al ni. — Tiel amuziĝas kelkiam la gestudentoj! . . .

### Dua tago: dimanĉo

En tiu ĉi tago mi vekiĝas kaj ellitiĝas, kiam miaj du K-doj jam maldormas. Mi ordigas la liton, lavas min, rakontante al la K-doj pri la hieraŭa vespero. Poste mi boligas teon sur la "Primus"-o kaj trinkas ĝin, legante freŝan n-on de la loka tagĵurnalo. Je la 10-a mi rapidas al la Universitatejo al okupo de nia fakultata ĉelo de "Societo por defendo de Sovetio" (kies membro mi ankaŭ estas). Apud la Universitatejo, grupiĝinte taĉmente, ni organizite marŝas al la ejo de Telefona Roto. Tie oni legas al ni mallongan lekcion pri "milittelefonio", kaj poste, dividiĝinte je grupoj, sub gvido de ruĝarmeanoj, ni rapide konstruas mem ĉiudirekte kelkajn milit-telefon-liniojn, tra stratoj, kortoj, kaj konstruoj. Estas tre vigle kaj interese!

Post tiu okupo, mi trame venas je la 12-a al klubo, ĉe kiu ni havas nian esp. lab. grupon. Tie ĵus estas finata la leciono ĉe esp. kurso. Iom post iom venas ge-SAT-anoj. Subite eniras, okaze alveturinta el provinco (urbo N i k o l s k - U s s u r i j s k), nia SAT-K-do S t e ĉ j o T. (gvidanto de tiea SAT-movado). Ni ĝoje salutas lin! Fine, mi komencas raporton al kursanoj kaj al SAT-grupo pri "Skemo de la lingva evoluo" (laŭ artikolo de K-do Spiridoviĉ en "S. R."). Tiu temo tre interesas kaj logas min. Mi arde, solide raportas, kaj estas kun granda intereso aŭskultata. Sekvas multaj demandoj.

Post la raporto, pro alveno de Steĉjo, ni okazigas kunsidon de nia distrikta SEU-komitato (mi ankaŭ estas ties membro). Steĉjo detale

raportas pri la esp. agado en Nikolsk. Ĝi estas vere brila. Junaj Gek-doj tie laboras vigle kaj entuziasme. Doninte al Steĉjo kelkajn konsilojn kaj solvinte kelkajn praktikajn problemojn, ni finas.

Rapide tagmanĝinte en la sama manĝejo, mi rapidas al kino, kie estas montrata fama filmo "Oktobro". Ankoraŭ hieraŭ la gestudentaro en nia grupo decidis viziti kino-teatron kune, kaj sendis unu K-dinon por aĉeti biletojn. Do, hodiaŭ ni marŝas. La filmo estas montrata en la plej bona kinoteatro, kun akompano de bonega muzik-orkestro. Ni alvenas kaj sidiĝas grupe, babilante brue.

Komenciĝas!... Ekvivas la ekrano. Estas vere eksterordinara vidaĵo. Petrogrado de famaj oktobraj tagoj de 1917, Kerenski kaj Lenin, la Provizora Registaro kaj la Kongreso de Sovetoj, burĝoj kaj laboristoj, maristoj kaj soldatoj tiutempaj ekstaras kiel vivaj sur la ekrano... Pleje impresas la momentoj de faligo de monumento de Aleksandro III-a en Moskvo, renkonto de Lenin ĉe Finnlanda stacidomo, la sangaj juliaj tagoj, la kunsido de Bolŝevika C. K. decidanta la ribelon, kaj fine la konkluda momento de Oktobra ribelo, kaj atako al Vintra Palaco... Bonege estas ankaŭ montrita la "fratiĝado" de rusaj kaj germanaj soldatoj sur la fronto.

Ofte, precipe kiam sur la ekrano aperas Lenin, la publiko brue aplaŭdegas. Precipe ardas ni gestudentoj. Finale, apoteoze estas montrata la parolado de Lenin ĉe la Kongreso de Sovetoj, akceptinta potencon, akompanata de aklamoj kaj muziko de Internacio. Ni vigle, amase eliras la kinon, interŝanĝante impresojn. Tiu ĉi filmo estas grandioza kaj neforgesebla. Mi vidis ĝin dufoje kaj pretas ankoraŭ vidi ĝin...

Dumvoje al hejmo mi renkontas K-dinon Z. Z. kaj ŝian edzon (ili estas miaj geamikoj, ambaŭ studentoj kaj SAT-anoj). Ili invitas min vespermanĝi. Mi volonte konsentas (ĉar mi havas en la poŝo interesegan libron); ni marŝas kune, kaj mi rakontas al ili pri la filmo "Oktobro". Fine ni atingas ilian liliputan ĉambreton; Z. Z. komencas "mastrumi" (kuiri kaĉon, teon ktp.), kaj mi komencas al ili legi.

La de mi legata libro (M. Breme: "Mortigita de l' vivo!") estas taglibro de juna germana knabino, pro kvazaŭa prostituado elturmentita ĝis la morto de polico kaj de burĝa medio. Vere terura historio!... Ni rapide vespermanĝas, kaj denove, kun ekscito, indigno kaj timo (pro sorto de heroino) laŭvice mi kaj Z. Z., tre impresitaj, legas la libron. Nur je la 2-a horo de l' nokto ni ĉesas pro dorm-deziro (ŝia edzo jam dormas). Mi lasas al ili la libron kaj tra la silenta, freŝaera nokto formarŝas hejmen.

Tie miaj K-doj jam dormas. Mi ankoraŭ dum kelkaj minutoj skribas freŝajn impresojn en mian karan taglibron, kaj fine mi enlitiĝas je la tria kaj ekdormas... K. Fade.

P. S. Karaj legantoj, ne opiniu, ke nia tuta vivo estas tiom riĉenhava kaj interesa. Ne, mia artikolo estas nur la esenco el multaj, multaj grizaj tagoj...

# 8-a Kongreso de SAT

## en Göteborg (Svedio)

(14—19. aŭgusto 1928)

Ĉion, kio rilatas al la kongreso adresu al: *Einar Adamson, Box 73, Göteborg, Svedio.*

### 13-a komuniko

**Fakkongreso de ĵurnalistoj-lab-korespondantoj** okazos se estas sufiĉe granda intereso por la afero. K-do B. Breslau, Moskvo, proponis, ke ni diskutu la demandojn: 1. Pri metodoj, rezultoj k perspektivoj de esp.-propagando per nacia gazetaro laborista. 2. Pri enkonduko k uzo de esp-o en internacia ĵurnalistiko, en redakcioj de mondgazetoj, en telegrafagentejoj, en informoj de internaciaj laboristorganizoj ktp. Se vi havas proponojn, skribu al K-do Einar Adamson, Box 73, Göteborg.

**Fakkunsido de liberpensuloj.** Ĉar multaj K-doj volas partopreni liberpensulan fakkunsidon, ni aranĝos tian. Bonvolu interrilati kun K-do Einar Adamson.

**Pri tendoj.** Kelkaj aliĝintoj demandis pri ebleco loki tendon en Göteborg. Jes, ĉiuj K-doj kiuj tion deziras, povas kunpreni tendon, ĉar ni havas tendlokon en la proksimo de la kongresejo.

**Pri la ékspozicio.** Kiel ni jam menciis, okazos tutsemajna esp.-ekspozicio dum la kongreso. Por interesi svedan gazetaron al esp-o, ni starigis gazetan fakon. Ni petas K-dojn diverslandajn plej baldaŭ sendi por tia fako div. nacilingvajn gazetojn, precipe laboristajn. Kompreneble ni bezonas almenaŭ ĉiujn gazetojn, kiuj favoras esp-on.

---

**La 10-a listo de aliĝintoj**

| | | |
|---|---|---|
| 331 | Bertil Kjellberg, Örebro, Svedio | 8059 |
| 332 | Gustaf Telander, Bjuv, Svedio . | 10 572 |
| 333 | Erland Seltborg, Bjuv, Svedio . | |
| 334 | Adolf Magnusson, Bjuv, Svedio | |
| 335 | Erland Johansson, Bjuv, Svedio | |
| 336 | Fritz Skoog, Göteborg, Svedio | |
| 337 | Nils Abrahamsson, Goteb., Sved. | 12 440 |
| 338 | Franz Zehrer, Chemnitz, Germ. | 6739 |
| 339 | Klara Lehmann, Leipzig, Germ. | 913 |
| 340 | Walter Vogel, Leipzig, Germanio | 174 |
| 341 | Grace M. Huggins, Peterborough, Anglio . . . . . . . . . . | 8215 |
| 342 | Gunnar Pettersson, Strömnäs, Bruk, Svedio . . . . . . . . | |
| 343 | Olga Pettersson, Ström. Bruk, Sv. | |
| 344 | Alfr. Spitzer, Neugersdorf, Germ. | 162 |
| 345 | Theodor Wöhrle, Siegmar, Germ. | 12 924 |
| 346 | Fritz Reuther, Siegmar, Germ. | 1667 |
| 347 | O. Kretzschmar, Meissen, Germ. | 8204 |
| 348 | Rogelio Luque, Cordoba, Hispan. | |
| 349 | Ir. M. F. Onnen, Gravenhage, Hol. | |
| 350 | John Rask, Borâs, Svedio . . . | |
| 351 | B. Breslau, Moskvo, Sovetio . . | |
| 352 | H. Ponĉik, Dnepropetrovsk, Sov. | |
| 353 | Erik Ahl, Atvidaberg, Svedio . . | |
| 354 | Nedjam Mohamed, Alger, Nord-Afriko . . . . . . . . . . . | |
| 355 | Alekseo Alalikin, Vjatka, Sovetio | 3982 |
| 356 | Nikolao Necenkov, Samara, Sov. | 12 116 |
| 357 | Otto Bruder, Halle, Germanio . . | 6150 |
| 358 | Ake Olsson, Bromölla, Svedio . | |
| 359 | Anna Gyllsdorf, Linköping, Sved. | |
| 360 | Axel Nilsson, Göteborg, Svedio . | |
| 361 | Willi Steinkühler, Berlin, Germ. | 3217 |
| 362 | Franz Ohnivas, Meissen, Germ. | 5496 |
| 363 | Max Benedix, Neukirchen, Germ. | 3338 |
| 364 | W. Buschmann, Neukirchen, Germ. | 11 910 |
| 365 | Hermann Rein, Fürth, Germanio | 10 072 |
| 366 | V. P. Piskunov, N-Novgorod, Sov. | 5432 |
| 367 | L. D. Belajev, N-Novgorod, Sov. | |
| 368 | M. Linder, Kirchseeon, Germanio | |
| 369 | Ludvig Kiel, Kirchseeon, Germ. | |
| 370 | Hija F. Puhalo, Zagreb, Jugosl. | |
| 371 | Reul, Würselen, Germanio . . . | 7233 |
| 372 | Kuriĉ, Moskvo, Sovetio . . . . | |
| 373 | Reinhardt, Ellefeld, Germanio . . | |
| 374 | Vincent, Paris, Francio . . . . | 7359 |
| 375 | Schneider, Frankfurt a. M., Germ. | 3162 |
| 376 | Hjalmar Lindberg, Billesholms Gruva, Svedio . . . . . . . . | |
| 377 | K-dino Burmistrova, Sovetio . . | 6765 |
| 378 | Bespalĉenko, Stavropol, Sovetio . | 12 529 |
| 379 | Per Filimonov, Pskov, Sovetio . | |
| 380 | Viktoro Ĉehoviĉ, Kiev, Sovetio . | 5627 |
| 381 | Vovoĵilov, Moskvo, Sovetio .. . | |
| 382 | Brukson, Leningrad. Sovetio . . | 1896 |
| 383 | Artur Emanielsson, Borås, Svedio | |
| 384 | Allan Andreasson, Borås, Svedio | |
| 385 | Harald Nyberg, Göteborg, Svedio | |
| 386 | J. A. Hansson, Munkedal, Svedio | |
| 387 | Edward Miller, Glasgov, Anglio . | |
| 388 | Jarlo Hoŝek, Zlim, Ĉeĥoslovakio | |
| 389 | K-dino Volkert, Nürnberg, Germ. | |
| 390 | Albin Johansson, Höganäs, Sved. | |
| 391 | Alma Brandt, Hudiksvall, Svedio | |
| 392 | Kurt Herold, Leipzig, Germanio | 12 108 |
| 393 | Reinhold Larsson, Amål, Svedio | |
| 394 | Fritz Nilsson, Amål, Svedio . . | |
| 395 | Carl Pahlke, Berlin, Germanio . | |
| 396 | Otto Keilwagen, Berlin, Germ. . | 8700 |
| 397 | Heinrich Klussmann, Dortmund, Germanio . . . . . . . . . . | 10 064 |
| 398 | Rudolf Patzelt, Warnsdorf, Ĉeĥoslovakio . . . . . . . . . . | 12 767 |
| 399 | Einar Norman, Malmö, Svedio . | |

# El la Redaktejo

Jen vi tenas en manoj la 16-paĝan jubilean numeron! Laŭ mia, eble ankaŭ laŭ via opinio ĝi bone elmontras la dinamikan forton, kiu estas vivanta en nia organizo. Ni povas liveri al niaj legantoj la ĉi tie prezentitan materialon, nur originalan kaj nur traktantan nian movadon, dank' al la fervora, volonteca kunlaborado de niaj K-doj. Ili sendis al ni kun bonvolemo siajn verketojn dediĉitajn al tiu ĉi speciala numero. Ili esprimis ĝojon, konfidon, esperojn. El iliaj linioj lumas la certeco pri venko. Ni dankas ĉi loke al niaj bravaj kunlaborintoj, kiuj per sia parto kunhelpis krei ĉi tiun kolektivlaboron. Ni esperas, ke tiu ĉi ampleksa kaj riĉe ilustrita kajero inspiros al niaj K-doj novan entuziasmon, novan kuraĝon, varbi kaj varbadi por plialtigi la nombron de abonantoj. Ju pli da abonantoj, despli multpaĝa, despli belaspekta via gazeto!

La venonta n-o aperos regule kun 8 paĝoj plus "La Lernanto". Ĝi enhavos la lastajn antaŭkongresajn sciigojn. Dum la posta semajno (Kongresa semajno), kiel kutime, ne aperos la gazeto. La unua postkongresa n-o, kiu portos la daton de 23. aŭgusto, ampleksos 12 paĝojn. N. B.

**Sekvantaj organizoj elektis oficialajn delegitojn al nia 8-a:**

**Tutsveda Kleriga Asocio de Laboristoj:** Parlamentano Ernst Eriksson, Stockholm kaj instruisto Ernst Jungen, Göteborg;

Sindikato n-o 31 de **Metallaborista Asocio, Hälsingborg:** Verner Svensson;

Sindikato n-o 33 de **Sveda Tekslaborista Asocio, Göteborg:** Carolina Norling;

**Socialdemokrata Junulara Klubo de Bjuv:** Gustaf Telander.

---

## PRIKONGRESAJ PROPONOJ

### Propono 13

La Jarlibro de SAT enhavu nur adresojn de SAT-perantoj k esp. lab. grupoj. Se en iu urbo aŭ vilaĝo ekzistas nur sola SAT-ano, tiam menciu lian adreson. En SAT-grupoj oni elektu SAT-peranton kaj vic-peranton.

### Propono 14

Adresojn de apartaj SAT-anoj presu nur por aparta pago en aparta fako.

### Propono 15

En kontrol-komitaton elektu 3 personojn.

(603)

---

## TRA LA MOVADO

(Kroniko)

**BULGARIO. Sofia.** La Lab. Esp. Grupo sciigas, ke ĉion rilatan al ĝi k al ĝia helpagado okaze de tertremo en Suda Bulgario (sumojn, leterojn ktp.) oni sendu nur laŭ jena nova adr.: Bulgario, Sofia, placo "Pozitano" N. 1, Rabotn. Partija, por Esp. grupo. La grupo ĝis nun kolektis ĉ. 8000 levojn bulg. Pro tiuj kolektitaj monsumoj la grupo sukcesis interesi multe da laboristoj por esp-o. En Plovdiv jam fondiĝis nova lab. esp. grupo. En Sofia estas aranĝata nova kurso. La LEA-grupo pritraktas la demandon pri eldono de organo en bulg. k esp-o. (10 286.) — **GERMANIO. Ammendorf.** Okaze de la regna laborista sportsemajno de 18.—24. 6. ni propagandis por esp-o. Ni partoprenis la prop. manifestacion de ĉiuj sportunuiĝoj kunportante esp. afiŝon. Dimanĉe ni portis afiŝegon kun surskribo: "Proletarioj — ĉiulandaj — unuiĝu per esperanto". — **HUNGARIO.** La lab. esp. movado havas nuntempe grandajn venkojn, ne nur koncerne al prospero de la kursoj aranĝitaj, sed rilate la ĝeneralan lab. movadon. 1. Ni aranĝis ŝipekskurson al Visegrad, en kiu partoprenis 700 Gek-doj (10. 6.). Ni elspezis por propagando tiutage 120 pengojn. Bona rezulto. La lab. sportfeston kun manifestacio (3. 6.) 30 K-doj esp-istaj partoprenis kun insignoj. 1. 7. ĉe partia popolfesto la esp-istoj faris efikan propagandon. La sola lab. organo ĉiutaga Nepszava konsentis aperigon de esp. art. dum ĉiu semajno foje. Eĉ ĝi aperigis longan artik. pri SAT k ĝiaj servoj. Ankaŭ Partszervezet, monata soc. dem. organo (eldonkvanto 25 000 ekz.) aperigas ĉiunumere priesp. art. (343.) — **JAPANIO.** Depost marto aperas ĉiusemajna ĵurnalo "Inprokor" sub la gvido de avangardaj laboristoj. "Intern. Proleta Korespondo" entenas kelkajn paĝojn esp. lingvajn pri la revoluc. prolet. k kamparana movado en Jap., Koreo k Formozo. Dum marto k aprilo ĉiuj redakcianoj kun K-do Otaguro kiel redaktoro estis arestataj pro "japana kompartia afero", sed iuj poste estas liberigitaj. Sed la atako de la polico kontraŭ la gazeto intensiĝas pli k pli. Ĉiuj ĝis nun eldonitaj n-oj estis malpermesataj. "Inprokor" celas revol. solidarecon de l' intern. Proletaro, kun devizoj: Por defendo de Sovetio, kontraŭ imperialisma milito, forigu la reakcian edukadon, ĉiun potencon al soveto! — En junio fondiĝis sub gvido de "Inprokor" Japana Prolet-Esperantista Unuiĝo (JPEU), kies CK troviĝas ĉe la redaktejo. JPEU baldaŭ eldonas sian organon "Kulturo k Emancipo". — **LATVIO.** Ĝis antaŭ nelonge ĉi tie ne ekzistis lab. esp. movado. Kvankam la neŭtrala societo en Riga kalkulas jam 15 jarojn de ekzistado, ĝia laboro apenaŭ antaŭenpuŝis la movadon. Nur kiam aperis la unuaj signoj pri naskiĝonta lab. esp. movado, la neŭtralula agado iom vigliĝis k oni eĉ aranĝis tutlatvian kongreson kun ĉeesto de estonaj k litovaj esp-istoj. Dume en jan. 1927 naskiĝis Lab. Esp. Societo, kiu malgraŭ sia mallonga ekzisto faris gravan propagandan laboron, ricevis multajn informpetojn el la provinco, interesis en Riga la laboristojn en fabrikoj k metiejoj. Ĝi organizis konstantajn raportadojn ĉe partioj, profunioj k aliaj lab. organizoj. Multe ankaŭ helpis Esp. Gazetservo per artikoloj lokitaj en lab. gazetoj. k flugfolioj. Organiziĝis kursoj ĉe partiaj regionoj. en popolaltlernejo k ĉe la societo mem. Filioj jam fondiĝis en Liepaja, Daŭgavpils k Tukum. Ĉe la prezid. en Tulum okazis antaŭ kelkaj semajnoj domtraserĉo; oni konfiskis div. dokumentojn k arestis la K-don. Li ankoraŭ troviĝas en malliberejo. 30. sept. okazos en Riga la unua tutlatvia lab. esp. kongreso. Tagordo: a) Latvia Lab. Esp. Soc. k aliaj lab. organizoj, b) Esp. movado en Latvio entute, c) Latvia Lab. Esp. Soc. k neŭtralaj esp. organizoj, d) Statutŝanĝo rilate elekton de C. K. k la elektoj mem, e) Diversaĵoj. (Antikristo.) — **SOVETIO. Krivoj-Rog.** 24. 6. okazis unua distr. esp. konferenco, dum kiu estis elektata distrikta SEU-Kto. Ankaŭ la konfer. decidis sendi 3 delegitojn al 8-a Kongr. de SAT. Adr. de l' Kto.: Krivoj-Rog, poŝtkesto 747. (5875.)

---



## RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

**Rus-Esperanta Vortaro** de E. Spiridoviĉ. Eld. CK. SEU, Moskvo 1928. — Adr.: Poŝtkesto 630, Moskvo. — Eldonkvanto 10 000 ekzempl. 176 pĝ. Formato: 11×15 cm. Prezo: 70 kopekoj.

Tiu ĉi vortaro ŝajnas esti sufiĉe kompleta kaj certe kontentigos niajn ruslingvajn uzantojn. Ni rimarkas, ke aldonitaj estas listo de geografiaj nomoj, listo de historiaj propraj nomoj, tempdifinoj, mezuroj k institucioj (sovetlandaj). Ankaŭ por SAT k la SAT-gazetoj estas reklamite. Ni bedaŭras nur, ke dubaj esprimoj kiel "fugi, ekskuzi" (pri kies neceso ni ne estas konvinkitaj aŭ kiuj almenaŭ ne estas jam oficiale aprobitaj) estas enpresitaj sen rimarko (steleto aŭ ia signo) pri ilia valoro. N. B.

**German-Esperanta Vortaro** de D-ro Emil Pfeffer. Dua eldono, 6-a—10-a milo. Eld. Tagblatt-Bibliothek, Wien I, Wollzeile 20. — 184 pĝ. Formato: 11½×19 cm. Prezo: 1 gmk.

Tiu ĉi dua eldono estas simpla represo de la unua (kiu jam estas recenzita de ni). Ni limigas nin, rimarkigi, ke la profito je tiu vortaro kuŝas en ĝia multvorteco (20 000 germanaj esprimoj kun 30 000 esp. tradukoj). Sed ni devas fari la saman rimarkon kiel por la supra vortaro: ne estas signitaj iel la dubaj vortoj (eksperimentataj, sed ne-oficialigitaj). N. B.

**Kie estas la mortintoj?** La Respondo de la Biblio, de J. F. Rutherford. Eldonis: Internacia Asocio de Biblio-Studantoj, Garda Turo, Biblio- kaj Traktat-Societo, Esp. Fako: Baden. Svisio. — 64 pĝ. Formato: 11×18 cm. Prezo: nemontrita.

Titolo k subtitolo diras al ni, kion celas klarigi al ni la konata reprezentanto de religia sekto per tiu ĉi broŝuro, sin apogante sur eldiraĵoj de la kristana biblio. N. B.

**Erckmann-Chatrian, L'Histoire de Michel au temps de la Révolution,** IV. Eldonis: L'Ecole Emancipée, Saumur (Francio).

Franclingva rakonto (aperigita revuforme) de konata aŭtoro por la Junularo.

**Novam. Monata revuo en Linguo internasiona.** Eldonanto: G. Touflet, 12, rue Fontaine, Paris (9-e).

Se troviĝas inter niaj legantoj personoj, kiuj volas denove eltrovi Amerikon, ili interrilatiĝu kun tiu nova gazeto, kiu propagandas novan projekton de lingvo.

---

## NIA POŜTO

**Ĉina Novaĵo-Servo.** — Viaj informoj jam delonge aperis en la ĉiutagaj ĵurnaloj; sekve ili ne taŭgas por nia semajna gazeto.

**8745.** — La art. pri Ŝevĉenko troviĝas en la presejo, sed ne povis, pro manko de loko, jam aperi. La nova art. aperos venontnumere, sed la bildoj ne estas sufiĉe klaraj por fari kliŝojn. Red.

**Kr. K. (Cmielow).** — Tempo absolute mankas al ni por respondi vian unuan demandon. En la kolekto de "S-ulo" vi povas trovi la de vi deziratan informon. — La vorto "spes" estas latina vorto: spes, -ei k signifas: espero. Sed eble vi aludas pri mallongigo uzata en Sovetio por nomi la specialistojn. — La vorto frato rilatas nur al viro, k necesas la almeto de la prefikso ge por ke "fratoj" povu rilati al ambaŭ seksoj. E. L.

**9134.** — Ni uzos en okazo de bezono, sed ni preferus ricevi originalojn.

**5296.** — Ni bedaŭrinde ne povas enmeti vian sendube pravan plendon kontraŭ fratorganizo, sed sendos vian leteron al ĝi.

**10 494.** — Ni ŝatas konsilojn, opiniojn k proponojn de legantoj, sed por ke oni vin bone komprenu, necesas, ke vi funde ellernu la lingvon.

**12 510.** — Jes, ni certe uzos la poemojn en iu kajero de "S. R.". Viaj artikoloj ĉiam estos bonakceptataj.

**10 586.** — Ni uzos en okazo de bezono. Monon sendu estonte al Leipzig.

**2144.** — Ni ne konas la adr. de la hisp. K-do, sekve ne povas transsendi vian manuskripton.

**10 032.** — Via manuskripto estas bonakceptita. Sed vi devas atendi ĝian vicon en la serio de "Tagoj".

**Krolikowski.** — Principe ni ne sciigas adresojn. Por tiaj aferoj servas nia jarlibro, sed vi ja ne estas membro. Adm.

**Proverbaro Esperanta**

laŭ la verko "Frazeologio rusa-pola-franca-germana" de *M. F. Zamenhof,* aranĝis *L. L. Zamenhof.*

Unu volumo in-8, 82-paĝa

**Prezo: 1,50 mk. g.**

**Adm. de SAT.**

## MEMORNOTO

**Represis el "La Lernanto":**

Sunday Worker (Dimanĉa Laboristo), London, 17. 6., Trafa respondo (majo).

**Priesper. artik. k notojn enhavis:**

Daily Herald, London, 6. 7.; Bulteno de I. T. F., Amsterd., jul./aŭg.; Der Deutsche Eisenbahner, Berlin., 8. 7. (kurso); Semajna rap. de VOKS, n-oj 26/27 (pri esp. k resumo en esp.); Le Sincériste, Waltwilder, julio (en esp.).

**Pri SAT-kongreso raportis:**

Sächs. Arb.-Zeitung, Leipzig, 4. 7.

---

**Sveda Laborista Esperantisto** (Svenska Arbetar Esperantisten) eldonis grandformatan ekstran numeron sub titolo Mond-esperanto-kongreso en Göteborg. Prezo: 25 öre. 4 paĝoj kun multaj ilustraĵoj k artikoloj en sveda k esp. lingvoj. Adr.: Box 73, Göteborg, Svedio.

---

**Korektoj.** — En n-o 199 korektu pĝ. 345, 1-a kol., linio 36 de supre: roto (anst. kompanio); pĝ. 346, 1-a kol., linio 14 de supre: kunvenintaro (anst. kunveno); sama pĝ., 2-a kol., linio 42 de supre: per li (anst. por li).

# K·O·R·E·S·P·O·N·D·A·D·O

**Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.**
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
**Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.**

**AŬSTRIO**

— Ni kolektive interŝ. PM kun komencantoj el la tuta mondo, escepte centr-eŭropaj ŝtatoj. Adr.: ALLE-grupo, Blumau ap. Felixdorf.

K-do Adolf Neuwirth, Auf der Mate, 2, Bregenz-Vorkloster, dez. koresp. kun gek-doj, partoprenontaj la 8-an SAT-kongreson. Mi preterveturos: Lindau, Berlin, Sassnitz, Trelleborg. Konatiĝo dum la vojaĝo dezirata.

**BULGARIO**

Bakalov Boĵidar, str. VI, Nr. 2, Plovdiv, dez. koresp. kĉl., PK, PI. (Mi estas 19 j. laboristo).

**FRANCIO**

K-do Broutchoux, 96, avenue de Versailles, Paris — 16, dez. koresp. kun K-doj de meblarmetio, pri sindikata, laboristsporta k teknika aferoj kĉl., precipe kun Germanio k Sovetio.

**GERMANIO**

— Perfektiĝantoj de kurso dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl. Adr.: August Heil, Seilerstr. 2-a, Ludwigshafen a. Rh.

**Stratŝanĝo:** H. Schuberth, Emmericher Str. 210, Duisburg-M. (antaŭe Wasgaustr. 40), dez. koresp. pri ĉ. temoj.

**Adresŝanĝo:** Gek-doj Elze, Merkurstr. 3/2, 1, an der Mötzlicherstr. Halle-Trotha. (Bonvolu noti tion en Jarlibro).

K-do Otto Lingner, Freiroda Nr. 2, b. Schkeuditz, dez. koresp. kun gejunkomistoj, precipe el Sovetio, ĉar en aŭgusto mi venos al Sovetio. Resp. garantiata.

K-do F. Hölzgen, Grüner Hof, 6, Köln-Merheim, interŝ. PK, PI, PM, kĉl.

K-do Wolf Koglin, Papenhuderstr. 45/47, Hamburg 24 (27 j., oficisto), deziras viglan koresp-adon kĉl. L, PI. Interŝ. de fotoj dezirata.

K-do W. Nittka, Unnaer Str. 19, Dortmund, dez. koresp. kun drattiristoj el ĉl., pri ĉ. temoj.

— Socialista junular-grupo, dez. koresp. kun tutmonda junularo proleta, pri ĉ. temoj L, PI. Certe resp. Adr.: K-do Karl Klenner, Altsorgauer Str. 19, Nieder-Salzbrunn i. Schles.

K-do Wilhelm Neumann, Angelweg, 5, Nieder-Salzbrunn i. Schles., dez. interŝ. muziknotojn (proletaj k popolkantoj), PI, kĉl.

K-do Adolf Vaupel, Berliner Str. 106, Werder/Havel, dez. koresp. kĉl. L, PI, bfl. Neniu restos sen resp.

K-do Otto Hapke, Berliner Str. 106, Werder/Havel, dez. koresp. kĉl. L, PI, bfl. Neniu restos sen resp.

K-do Leopold Anhalt, Brandenburger Str. 138, Werder/Havel, dez. koresp. kĉl. L, PI, PM, bfl. Neniu restos sen resp.

**JUGOSLAVIO**

K-do Dimitrije Sanĉanin, str. Haĝi Milentijeva, 30, Beograd, dez. koresp. kĉl. PI.

**LATVIO**

K-do Joseph Gold, Matisa iela, 31-16, Riga, dez. koresp. kĉl. L, PI, PM, bfl, ankaŭ kun anarkistoj. Resp. garantiata.

**LITOVIO**

K-do Riŝkus Stasys (24 j., lab.), Kauno str. 9-a, Radviliŝkis, dez. koresp. kĉl. pri div. temoj. Certe resp.

**PORTUGALIO**

**Adresŝanĝo:** K-do Leonel da Cruz, Travessa Henrique Cardoso, 91, porta 2 D-to, Lisboa-Norte. (Liaj koresp-antoj bonvolu noti tion).

**SOVETIO**

K-do Boris Grigorjev, Teknikumo de ligilo, Gorohovskaja str. 16, Moskvo 66, dez. koresp. kĉl. pri div. temoj, L, PI.

K-do A. Ŝatalov (instruisto), P. O. Bobrovskije Dvory, Kursk. gub. v. Ĥvorastjanka, dez. koresp. pri div. temoj kĉl. ankaŭ kun USSR. Resp. garantiata.

K-do F. Labuznyj, ul. 3 Internacionala, 41, Brjansk, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj.

K-do G. Davidkin, Dzerĵinskogo str. 9, kv. 21, Leningrad, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj, L, PK, il. gaz.

— Rondetoj de junuaj geesp-istoj ĉe Pskova Pedteknikumo, dez. koresp. pri junulmovado k. a. temoj kĉl. Resp. garantiata. Adr.: K-do F. Gerasimov, ul. Libkneĥta, Pedteknikumo, Pskov.

K-do M. Ustinov, Tolstoj str. 26, d. de Egorov, Abdulino, Samarskoj gub., dez. koresp. kun geinstruistoj el Francio, Japanio k Svedio pri laboredukado k filologio.

K-do Andreo Jadrihinskij (oficisto), Gluhoozerskaja, 1/3, Hleboprodukt, Leningrad, dez. koresp. kĉl. pri sporto.

K-do Arkadio Zavinskij, Ligovskaja, 44/210, Leningrad, dez. koresp. kĉl. pri sporto.

— Rondeto de Esp. ĉe Klubo de grandega fabriko dez. koresp. kun gek-doj el ĉl. Adr.: Leningrad 20, ul. Staĉek, 2 Klub zavoda Krasnij Treugolnik.

— La ĉelo de IRH en lernejo 5 de Sebastopol dez. koresp. kun lernantoj el germ. lernejoj. Adr.: Sebastopol, ŝkola, 5, ĵaĉejke MOPR.

**URUGVAJO**

K-do E. Rezzano, Usina-Electrica-Del-Estado, Santa Lucia-Canelones, Montevideo, interŝ. PI, PM, monerojn kĉl., ne sendas unue, sed garantios resp. Koresp. pri terkulturo.

**STUDENTOJ DE GERMANIO**

Ne rifuzu informi min pri **supera teknika lernejo,** troviĝanta en via urbo: 1. Ĉu oni akceptas tien kiel studantojn **sovetlandajn junulojn;** se jes, ĉu oni limigas kvanton da sovetianoj per difinita %? 2. Kiujn dokumentojn devas prezenti sovetia junulo? 3. Ĉu fininte sov. lernejon de 1-a k 2-a ŝtupo (kune 9 jaroj) oni devas fari ekzamenon enirante vian sup. tekn. lern.? aŭ ĉu oni akceptas sen ekzameno? 4. Kiun tekn. specialecon donas via tekn. sup. lern.? 5. Daŭro de lernado en ĝi? 6. Kiom faras en via urbo lu-pago por plej modesta studenta ĉambreto? 7. Kiom kostas pomonate plej simpla, sed nutra tagmanĝo? — Bonvolu resp. laŭ adreso: T. Dajber, ul. Sakko i Vancetti, 3, kv. 9, **Orel,** Sovetio. Akceptu antaŭe koran dankon!

---

**Serioza enketo**

K-do A. Soares (villa magnagna), Quartier du neuf Hopital à S. Jean de Luz (B. P.), Francio, petas de ĉiuj kompetentaj Gek-doj el ĉ. l. informojn pri kampara k urba meza salajro por ambaŭ seksoj laŭ 8-hora labortago (ĉion aparte). Antaŭan dankon!

---

**Kiu negermana K-do,** revenante de l' 8-a kongreso, emus raporti la 6-an de sept. en Dresden? Por tranoktejo k manĝaĵo estas zorgate. Bonvolu tuj skribi al: **R. Szczepanski, Dresden-A 24,** Reichsstr. 20 (Germanio).

---

## ENHAVO:


| | pago |
|---|---|
| Civilizeco kaj Artefariteco | 351—52 |
| Ĉe la sojlo de l' tria cento | 352 |
| La kondiĉoj por la venko de esp-o | 353 |
| De iu, kiu ĉeestis | 353—54 |
| Dornoj | 354 |
| Kiam la patrino de "S-ulo" venis al Leipzig | 354—55 |
| Marksismo kaj esperanto | 355—56 |
| Komprenemo kaj pripensemo | 356 |
| Interkomunikiĝo | 356—57 |
| Saluton al "S-ulo" el nordo | 357 |
| Studeto pri estonta SAT-literaturo | 358 |
| Nia edukilo | 358—59 |
| Kiel juĝas la Legantaro pri "S-ulo" | 359—60 |
| La instigo de nova SAT-ano | 360 |
| Raporto de la Gvidanto de "S-ulo" | 361 |
| Zamenhof-paĝo | 362 |
| Inter ni | 363 |
| Du neordinaraj tagoj el studenta vivo | 363—64 |
| El la Redaktejo | 364 |
| 8-a Kongreso de SAT | 364 |
| Prikongresaj proponoj, Kroniko, Recenzejo, Nia poŝto | 365 |
| Memornoto, Korespondado | 366 |


Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)